

ISSN 1846-5021

GAZETO DE
ZAGREBAJ ESPERANTISTOJ

Zagreba Esperantisto

ԹՈՒՅՆՅԱԼԻ
ՉԵՐՈՅԵՆԻՔՄԱՅԸՄԱՅ

Ĉi-numere legu pri:
QUO VADIS, ESPERANTO?
OMAĜA RENKONTIĜO KUN TIBOR SEKELJ
35-JARA JUBILEO EN SISAK
ETA REMEMORO PRI "ZORGULO"
**KRISTNASKA STELO:
ĈU MISTERO SOLVITA?**

Libroeksponicio en Sisak

5

2013

Eldonanto:

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj
HR-10000 Zagreb, Goljak 43

Ĉefa kaj respondeca redaktoro:

Radenko Milošević
Goljak 43
HR-10000 Zagreb
radenko.milosevic@zg.htnet.hr

Plenumredaktoro:

Josip Pleadin
B. Jelačića 138 A
HR-48350 Đurđevac
Kroatio
josip.pleadin@gmail.com

Ekspedejo:

Grafokom, p.p. 96
HR-48350 Đurđevac
Kroatio
grafokom@kc.htnet.hr
zagreba.esperantisto@gmail.com

Redakcianoj:

Krešimir Barković, Snježana
Habulin, Marija Jerković, Jozo
Marević, Radenko Milošević,
Josip Pleadin

Presis:

Grafokom, Đurđevac

Jarabono (6 numeroj):

120,00 kunaoj / 18,00 eŭroj

Pagebla al konto de Dokumenta Esperanto-Centro:

HR5023600001102158381

aŭ al UEA-konto:

deoc-f

RESUMO

La ĉi-numeran resumon ni volas komenci per kelkaj bonaj informoj. Anonima subvencio el Svislando ebligas al "Zagreba Esperantisto" fini la jarkolekton 2013 sen financaj malfacilaĵoj, kaj unu projekton de UZE per konsiderinda sumo financis ankaŭ la Urbo Zagrebo! En novembro Dokumenta Esperanto-Centro ricevis ankoraŭ unu internacian rekonon: atingis ĝin granda foto-kolekto de la forpasintaj geedzoj Fornal el Pollando. Siaflanke, UZE relanĉas la Literaturan konkurson "Ivo Rotkvić" de la iama Zagreba Esperanto-Ligo, kun la celo motivigi esperantistojn verki kaj traduki, ĉar UZE malfermas por ili la paĝojn de "Zagreba Esperantisto" kaj klopodos publikigi apartajn librojn de iliaj verkoj.

Kunlige kun la datreveno de Tibor Sekelj, ankaŭ ĉi-numere la saman temon pritraktas kelkaj artikoloj. Unu el ili raportas pri la aranĝo organizita honore al Tibor Sekelj en Subotica. Alia artikolo analizas la verkojn de Tibor Sekelj el lingvistika aspekto, kaj la tria artikolo estas la 5-a ĉapitro el la komune tradukata verko de Tibor Sekelj "De Patagonio ĝis Alasko", kiu aperos en 2014.

La ĉefartikolo ĉi-numere resumas la eventojn en la kroatia Esperanto-movado, kiuj tempestis en 2013, sed kies konsekvencoj povas esti rigardataj ne nur negative.

El malmultaj eventoj okazintaj en Kroatio en novembro, pli detale ni mencias la 35-an datrevenon de Esperanto-societo en Sisak.

La aktuala numero estas iomete pli beletra (literatura) ol kutime, ĉar ni aldonas ĉapitron el la verko "La triĝiba monto", tradukitan el la hungara. Por kroatoj ĝi estas interesa ĉar la eventoj okazas en Kroatio, kaj por internacia publiko ĉar la ĉefa temo estas la unua mondmilito, kies komenco okazis antaŭ preskaŭ unu jarcento.

El kroataj interesaĵoj ĉi-foje ni mencias la tradicion de "moresko" en Korĉula, kiel lastan spuron de tiu danco iam konata en la tuta mediteranea regiono.

Pluraj internaciaj novaĵoj estas menciitaj, de diversaj aranĝoj, ĝis novaj redaktoroj, estraroj, direktoroj ktp. en la movada strukturo.

Nia itala kunlaboranto denove artikolas pri la Kristnaska stelo, kaj originalan rakonton verkis nia rumana kunlaborantino.

La lasta numero de tiu ĉi jarkolekto aperos en januaro 2014, kaj en ĝi vi povos legi pri festado de Zamenhofa tago, kiun ĉi-jare organizos UZE en Zagrebo.

Agrablan legadon ankaŭ estonte deziras al vi

La redakcio

QUO VADIS, ESPERANTO?

 Josip Pleadin

Proksimiĝas la fino de la jaro 2013, kiun mi volus resumi kaj komenti sen ia ajn malbona intenco. Pesimistoj vidus ĝin aparte malfacila, kaj optimistoj komentus, ke ekzistis eĉ pli malfacilaj jaroj en nia historio. Tamen, reale observante, ĝi estis unu el pli malfacilaj jaroj ĉiasence. Kiel mi aŭguris en la retmesaĝo al la Estraro de Kroata Esperanto-Ligo (KEL) en novembro 2011, la financoj kiujn KEL ricevadis de Ministerio pri kulturo, en 2013 draste malaltiĝis. Tiu fakto povis surprizi neniu, kvankam multaj esperis ke tio ne okazos.

Dum preskaŭ unu jardeko kroataj esperantistoj havis malsamajn opiniojn pri kelkaj aferoj, ĉefe pri la aĉeto de la estonta sidejo en Vodnikova strato. En 2013 tiuj problemoj kulminis en la diskutoj kaj kvereloj, kiuj en la taglumon tiris ankaŭ aliajn malkonkordojn.

Se geedzoj ne povas kunvivi, ili divorcas! Ankaŭ KEL kaj ĝiaj societoj iasence divorcis pro la malsamaj opinioj. Por momento nur figursence, sed en la aero ŝvebas ankaŭ la danĝero de reala "divorco". Kiu kulpas? Tio jam ne plu gravas, sed efektive en ĉiu konflikto ne nur unu flanko kulpas. Por divorci ne gravas kiu kulpis pli, sed ke la konfliktoj fariĝis tiom neelteneblaj kaj oftaj, ke ekzistis pli da aferoj dividantaj ol kunigantaj.

Je la ekzemplo de KEL temas pri esencaj aferoj, respektive pri la strategiaj kaj taktikaj demandoj, ĉirkaŭ kiuj ne ekzistas ambaŭflanke akcepteblaj interkonsentoj. Post la lasta jarkunveno la t.n. opozicio, kiu akre kritikis la agadon de la Estraro de KEL, ne entreprenis la proceson de eksmembrigo el KEL, sed tamen distanciĝis de ĝi. Per arma jargono oni dirus ke temas pri armistico.

Al la t.n. opozicio oni riproĉis, ke ĝi agadas malamike kontraŭ KEL, kaj ke ĝi estas unu el la ĉefaj problemoj de KEL nuntempe. Se juĝi laŭ tio, post la retiriĝo de la t.n. opozicio solviĝis la plej grava problemoj de KEL, kaj nun la tegmenta organizaĵo de kroataj esperantistoj devus funkcii sen malfacilaĵoj. Sed, KEL daŭre dronas en la amasiĝintaj problemoj de la pasinta jardeko, sen trovo de adekvata solvo. Sekve, la akuzoj kontraŭ la t.n. opozicio estis nur preteksto, per kiu oni volis kaŝi multe pli gravajn problemojn. Supozeble ankaŭ la elekta jarkunveno en 2014 ne solvos la aferon.

Eble la ĉi-sekva opinio sonos hereze por la ortodoksaj KEL-anoj, sed mi opinias, ke vere ne plu ekzistas iu ideo aŭ intereso, tenanta forte la nun ekzistantajn Esperanto-societojn en la sino de KEL. Ankaŭ tiu aserto povas surprizi nur tiujn, kiuj ne konas la realajn cirkonstancojn.

Unuflanke ekzistas la proverbo ke "kune ni estas pli fortaj". Ĝi funkcias ĉe samcelanoj, aŭ ĉe tiuj kiuj difinas komunajn celojn per ambaŭflanke

akceptebla maniero. En KEL, male, dum jardekoj regis tute kontraŭa maniero. Deklaroj ke "se vi volas ion organizi aŭ entrepreni, trovu mem proprajn aktivulojn kaj la necesan monon", venadis konstante el la KEL-estraro, kvankam aliffoje ni aŭdis ke "ni ĉiuj estas KEL". Oni proklamis ke "la membraro estas nia plej granda valorajo", sed inter la linioj legeblis, ke temas nur pri tute obeema membraro, kiu nek ion demandas, nek pri io interesiĝas, sed servas kiel statistikaĵo se oni bezonas prezenti nombrojn ĉe iu institucio. En la praktiko KEL absolute ne okupiĝis pri varbado de novaj membroj, sed temis pri sporadaj sukcesoj de unuopaj aktivuloj kaj societoj.

Se vi, kara leganto, travivis la ŝokon kaŭzitan per la legitaj frazoj, nun ni daŭrigu pritrakti la aferon pli sobre.

Kelkaj estraranoj diktas al ni, ke nuntempe la sola mezurilo de la aferoj estas la merkato. Sekve, oni devas adaptiĝi al la merkataj leĝoj. Se vere ni devas en ĉio sekvi la merkaton, tiam KEL estas kondamnita al bankroto, ĉar ĝi perdis la subvenciojn de Ministerio pri kulturo kiuj tenis ĝin vivanta, ĉar ĝi repagas kreditojn pagotajn ankoraŭ dum 12 jaroj, kaj ĉar la membraro malkreskas kaj postulas por sia kotizo ian konkretan servon. Kiel ni jam aŭdis, la ĉefa problemoj de KEL estas financoj por kovrado de ĉiutagaj elspezoj.

Mi devus esti vere nereala klopodante rememori ian ajn allogan servon kiun KEL nuntempe proponus al sia membraro.

Tial inter la membraro tute prave cirkulas la demando: Kial iu societo restu membro de KEL? La membraro devas pagadi kotizon, ricevante nenion, kaj samtempe povas influi neniajn decidojn aŭ ŝanĝojn. Se tio funkciis antaŭe, en la merkataj cirkonstancoj tio absolute ne funkcias!

Se ni jam pritraktas tiun ĉi temon, ni klopodu vidi ĝin en pozitiva lumo! Kion pozitivan alportus eksmembrigo de iuj societoj el KEL? Certe ĝi alportus konkuradon inter la societoj, kio ja estas la ĉefa kondiĉo de la merkato! Se oni konkurus, oni serĉus konvenajn kunlaborantojn kaj komunajn interesojn, sekve ankaŭ farus aliancojn bazitajn sur interesoj anstataŭ sur diktado. Kaj fine, la eksmembrigo de societoj solvus la problemon pri la kolektiva kaj individua membrecoj. Tiam ĉiu povus esti samtempe kaj (kolektiva) membro en sia loka societo, kaj (individua) membro de KEL.

Mi esperas, ke ĉi tiun opiniprezenton vi, karaj legantoj, ne taksos kiel novan atakon kontraŭ KEL, ĉar ĝi tia ne estas. Mi daŭre asertas, ke KEL devus pli multe okupiĝi pri organizaj aferoj en la bazo, se ĝi ne volas resti "armeo de generaloj sen soldatoj". Se ĝi tion ne kapablas, ĝi perdis la sencon de ekzisto kaj maltrafis sian historian rolon.



Preskaŭ nerimarkite pasis la 140-a datreveno de naskiĝo de escepte talenta virino, la unua profesia ĵurnalistino en Kroatio - **Marija Jurić Zagorka**, kiu naskiĝis la 2-an de marto 1873 en la vilaĝo Negovec. Krom la ĵurnalista kariero, ŝi elstaris ankaŭ kiel verkistino, kies romanoj estis plej ofte legata literaturo en Kroatio. Ŝi redaktis la gazetojn "**Obzor**" kaj "**Hrvatica**", kaj fondis la unuan porvirinan gazeton en Kroatio - "**Ženski list**". En sia ĵurnalismo ŝi batalis kontraŭ socia diskriminacio, hungarigo kaj germanigo de Kroatio, kaj pledis por virinaj rajtoj. En la beletra verkado ŝia granda subtenanto estis la episkopo **Josip Juraj Strossmayer**, kiu instigis ŝin verki romanojn. Ŝi verkis amplekseĝajn, plurvolumajn romanojn kun elementoj el la nacia historio, kiuj estis vaste popularaj ĉe la legantaro.

Ŝi naskiĝis en bonstata familio, sed laŭ la propra atesto, ŝi travivis malfeliĉan infanaĝon. Ŝi kreskis en la regiono de Zagorje, kie ŝia patro posedis la bienon **Golubovec**. Popolternejon ŝi frekventis en Varaždin kaj Zagreb. Pro la evidenta inteligento kaj

MARIJA JURIĆ ZAGORKA

✍ Josip Pleadin

talento esprimita ankoraŭ en popollernejo, la patro intencis sendi ŝin studi en Svislando, sed la patrino kontraŭis tion. Pro la malbonaj cirkonstancoj en la familio, ŝi ĉesigis la lernadon, sed poste daŭrigis ĝin en la zageba monaĥinejo de sankta Vinko Paulski (*Vincentius a Paulo*). Post tio ŝi forlasis Zagrebon, kaj revenis nur sep jarojn poste. En Zagrebo ŝi pasgis la reston de sia vivo kaj forpasis la 29-an de novembro 1957.

En sia unua geedzeco kun la hungara fervojoficisto **Andreo Matraj** ŝi vivis nur tri jarojn. Ili divorcis pro la naciisma sinteno de la edzo, kiu postulis ke ŝi verku en la spirito de hungara naciismo. Ŝi rifuzis tion pro la profunda amo al sia patrujo. La geedzeco finiĝis tre dramece per ŝia fuĝo el la geedza hejmo, kaj per posta divorco.

La dua geedzeco kun la ĵurnalista kolego **Slavko Vodvařka** daŭris dek jarojn.

Ŝia unua artikolo aperis en 1896 en "**Obzor**", post kio ŝi fariĝis redakticiano de la gazeto, sed ŝi devis skribi kaŝe, por ke la publiko ne sciu ke temas pri virino. Ŝi raportadis pri politikaj eventoj el Vieno kaj Budapeŝto.

Ŝia unua romano ("**Sklavoj**") aperis en 1899 en daŭrigoj en "**Obzor**". La unuan afirmiĝon ŝi akiris per sia romano "**La sorĉistino de Grič**" (1912-1914). Ŝi publikigis dudekon da romanoj, sed la tuta verkaro konsistas verŝajne el pli ol 30 romanoj. Ĉar ŝi ne povis adaptiĝi al literaturaj kaj stilaj matricoj de sia tempo, ŝiajn romanojn ne akompanis seriozaj literaturaj kritikoj. La romanoj plejparte aperadis en daŭrigoj en diversaj gazetoj ("**Male novine**", "**Obzor**", "**Jutarnji list**", "**Ženski list**", "**Hrvatski dnevnik**" kaj "**Hrvatica**"). Krom la romanoj, ŝi verkis ankaŭ komediojn, unuaktaĵojn kaj satirojn. Konataj verkistoj de ŝia tempo malfavoris ŝin, kaj la meritita atento al ŝia verkaro aperas apenaŭ nuntempe. Eble plej trafte ŝin karakterizis **Pavao Pavličić** en siaj "Leteroj al famaj virinoj" skribinte: "*Vi anticipis vian tempon ĉiense, kaj eble apenaŭ tiu ĉi epoko estus la ĝusta tempo por vi.*"

Ĉe la fino jen la titoloj nur de kelkaj ŝiaj furoraĵoj: "**La sorĉistino de Grič**" (ciklo de 7 romanoj), "**Gordana**", "**La filino de Lotrščak**", "**La reĝino de kroatoj**", "**La princino el Petrinjska-strato**" kaj aliaj.

LA UNUA IRANA ESPERANTO-KONGRESO. Laŭ la informo de Irana Esperanto-Asocio (IREA) la unua Irana Esperanto-Kongreso, okazos de la 24-a ĝis 26-a de marto 2014. Ĝi estas unika okazo por viziti la landon kun longa Esperanto-historio. La kongreso koincidas kun la iranaj nov-jaraj ferioj kaj la kongresa temo estas *"Esperanto, Lingvo de Ideo kaj Idealo"*. En la programo estas planitaj kulturaj aranĝoj kiel arta vespero kaj muziko dum la unuaj du tagoj kaj ekskurso por la lasta tago de la kongreso. Eksterlandanoj bonvolu kontroli ĉu ili bezonas vizon por eniri la landon, kaj IREA klopodos helpi laŭbezone. La partopren-kotizo por eksterlandanoj (70 eŭroj) kovras ĉiujn kostojn dum la kongreso krom la tranokto kaj estas pagebla surloke. Pliaj informoj ĉe: info@espero.ir

STANO MARČEK ESTAS LA NOVAREDAKTORO DE "JUNA AMIKO". La slovakia esperantisto kaj ĵurnalisto Stano Marček, kiu forlasas la redaktadon de la revuo "Esperanto" de UEA, fariĝis redaktoro de "Juna Amiko" – internacia revuo de ILEI por komencantoj kaj novaj lernantoj.

MALFERMITA ESPERANTO-MUZEO EN ĈINIO. La inaŭguran ceremonion de la internacia Esperanto-muzeo en la Universitato de Zaozhuang en orienta Ĉinio, okazintan la 16-an de novembro, dum la 10-a Ĉina Kongreso de Esperanto, partoprenis pli ol 300 esperantistoj kaj gastoj el Ĉinio, Koreio, Japanio kaj aliaj landoj. La Muzeo kun 680 kvadrataj metroj kaj 26.000 kolektaĵoj estas kunkonstruita de Ĉina Esperanto-Ligo kaj la Universitato de Zaozhuang. Dum la prova malfermo en 5 monatoj pli ol 7000 vizitantoj estis akceptitaj de la muzeo, kiu jam fariĝis bazo por diskonigi Esperanton al la publiko. La muzeo ricevis pli ol 80 gratulajn mesaĝojn el 30 landoj. Poŝta adreso de la muzeo estas: *Zaozhuang Xueyuan*

Shijieyu Bowuguan. Shandong. Ĉinio. CN-277100 kaj la retadreso: semio@163.com

ETSUO MIYOSHI RICEVIS ORDENON. La japana esperantisto kaj mecenato de Esperanto *Etsuo Miyoshi* ricevis la 12-an de novembro en la Imperiestra Palaco en Tokio la Ordenon de la Leviganta Suno. Ĝi estis donita al li pro la kreo de la bastonvalizo *Walkin'Bag*, kiu helpas handikapulojn moviĝi.



KOREA KONGRESO DE ESPERANTO. La 45-a Korea Kongreso de Esperanto okazis en Incheon la 26-an kaj 27-an de oktobro kun la ĉeftemo *"Esperanto kiel dumviva lernado"*. Partoprenis 143 esperantistoj el 6 landoj. La kongresa temo estas ligita kun la projekto "Dumviva lernado", lanĉita de la distrikto Namdong en 2009 en Incheon. En la ĉeftema simpozio siajn opiniojn esprimis *Ma Youngtae*, *Ymasita Tosihiro* kaj *Shin Eunsook*. En la Kongresa Universitato prelegis prof. *Markus Gabor* pri "De Nanzan ĝis Namsan kaj plu" kaj *d-ro Kawanisi Teturou* pri la historio de reformado de Esperanto. Okazis ok fakaj kunsidoj, kaj en la

ĝenerala kunsido de KEA prof. *Lee Young-gu* estis elektita kiel nova prezidanto de KEA. Tri personoj estis premiitaj: *Lee Jungkee*, estro de Seula Esperanto-Kulturcentro, ricevis la 13-an Hajpin-Premion, la premion pro la kontribuo al la korea Esperanto-movado ricevis la filio en *Gwangju-Jeonnam* pro la sukcesa okazigo de la 44-a KKE en 2012 kaj *Cho Myungja* (Ĝoja) pro la redaktado de la kongresa libro dum pli ol 10 jaroj. Oni gratulis per torto kaj floroj tri veteranojn: *Seong Taegi*, *Kim Youngmyung*, *Lee Nakkee*.

LA 100-a JAPANA ESPERANTO-KONGRESO EN TOKIO. La jubilean Japanan Esperanto-kongreson organizis Japana Esperanto-Instituto en Tokio inter la 12-a kaj 15-a de oktobro kun 719 aliĝintoj el Japanio, Koreio, Ĉinio, Nepalo, Vjetnamio, Taĝikio, Irano kaj 23 aliaj landoj, kio donis al ĝi veran internacian noton. La unua japana kongreso okazis en 1906 kaj la 100-a havis la kongresan temon *"Esperanto ligas homajn korojn – de la pli ol 100-jara historio al estonteco"*. En la publika prelegkunsido pri la rolo de Esperanto en la moderna Japanio prelegis prof. *Gotoo Hitosi* kaj *d-ro Ulrich Lins*, kaj prof. *Kimura Goro Christoph* parolis pri la estonta rolo de Esperanto kiel la ponto por dialogo inter Japanio kaj la mondo. Prelegis por la kongresanoj *Lee Jungkee* el Koreio, *d-ro Markus Gabor* el Hungario, *Joel Amis* el Kanado kaj *Osmo Buller*. Koncertis *JoMo* kaj kelkaj japanaj esperantistoj-muzikistoj.



FESTITA LA 35-JARA JUBILEO EN SISAK

 Nataša Dorosulić



Esperanto-societo "Sisak" estis refondita antaŭ kvin jaroj (2008), sed la tradicio de organizita laboro por Esperanto en nia urbo ekzistas ekde la jaro 1978, kiam la societo estis unuafoje fondita. Pro tio ni decidis ĉi-jare festi la 35-an datrevenon de nia societo per la programo "*Esperantistoj al sia urbo*", kiu okazis la 4-an de novembro.

La solenaĵo estis organizita en la *Popola biblioteko kaj legejo "Vlado Gotovac"*. Kunlabore kun *Dokumenta Esperanto-Centro* el Đurđevac, la 4-an de novembro estis malfermita la pentrajekspozicio "*Azia paletro*" de la korea esperantisto-pentristo *Ho Song*, kiun ŝatantoj de pentroarto povis viziti ĝis la 11-a de novembro.

Krom la pentrajekspozicio, estis prezentita tre riĉa ekspozicio de Esperantaj libroj kaj ekspozicio de "*Zagreba Esperantisto*".

Aparte interesa estis prezento de la libro "*La Tilia Urbo*" de *Marija Horžinek*.

Pri la tuta programo enkonduke parolis la prezidantino

de Esperanto-societo "Sisak" *Nataša Dorosulić*, post kio sekvis impresa parolado de profesorino *Jadranka Gabriša Perković*, bibliotekistino de lerneja biblioteko en la *Industria-metia lernejo* de Sisak, pri la libro "*La Tilia Urbo*". Profesorino *Gabriša Perković* pretigis ankaŭ komputilan projekcion kombinante citaĵojn el la libro kaj fotojn de *Petrinja*, kio tre efike prezentis la esencon de la aŭtorina amo al sia urbo. Profesorino *Gabriša Perković* estis lernantino de *Marija Horžinek*, en *Petrinja*, ĉe kiu ŝi lernis Esperanton.

Ĉapitrojn el la libro de *Marija Horžinek* legis en Esperanto *Nataša Dorosulić* kaj *Ljiljana Bonev*, studfinanto de la *Forstista fakultato*, kaj en la kroata *Anamarija Tubić* kaj *Kristijan Marković*, la membroj de legista grupo "*Tulum slova*".

La pentrajekspozicion de *Ho Song* per sia parolado kaj faka taksado malfermis la artprofesorino *Marijana Milas* el la Gimnazio de Sisak.

Pri libro- kaj gazet-ekspozicioj parolis *Josip Pleadin*

el *Dokumenta Esperanto-Centro*, menciante aparte la literaturan valoron de Esperanto. Parolante pri la libro de *Marija Horžinek*, kies tradukinto li estis, *Josip Pleadin* akcentis, ke la iniciato por traduki kaj eldoni la libron venis de la vicprezidanto de Esperanto-societo "Sisak" *Srečko Radulović*, kiu pro la malsano ne povis partopreni la solenaĵon.

En la organizado de la tuta aranĝo kaj disponigo de la ejo, apartan dankon oni ŝuldas al s-ino *Ljiljana Šorgić*, laborantino de la Popola biblioteko kaj legejo "Vlado Gotovac".



LA EKSPOZICIO "AZIA PALETRO"

✍️ Marijana Milas

Dum siaj vojaĝoj kaj renkontiĝoj kun esperantistoj tra la mondo, la sudkorea pentroartisto kaj instruisto de Esperanto *Ho Song* per siaj pentraĵoj proksimigas al la publiko la belecon kaj etoson de sia naskiĝregiono. La ekspozicio titolita "*Azia paletro*" al Sisak venis post Bjelovar, kie ĝi gastis, kaj hodiaŭ *Ho Song* sin prezentas al la loĝantaro de Sisak, okaze de la manifestacio "*Esperantistoj al sia urbo*".

Ni scias ke Esperanto sukcese forigas lingvajn barojn en homaj interrilatoj, ke ĝi konstruas pontojn de kompreno, gvidas al amikeco inter popoloj kaj rasoj. Simile faras ankaŭ la universala lingvo de pentroarto, la lingvo de "*bildoj kiuj parolas pli ol mil vortoj*". Kvankam sur siaj pentraĵoj la aŭtoro transportas la realismajn bildojn de vizuala realeco de fora lando el kiu ĝi venas, tiu mondo al ni ŝajnas proksima en la travivado de delikataj, intimismaj scenoj de pejzaĝoj kaj objektoj. El ili ni legas la pentristan lirikan sentebilon, la



romantikan karakteron kaj la amon al la naturo. La pentristo per siaj pentraĵoj nin gvidas tra mallarĝaj padoj al solecaj montopintoj, trans herbejoj plenaj de floroj, preter riveroj kaj lagoj sur kiuj naĝas gruoj, ĝis la dezertaj kaj foraj marstrandoj kun malmultnombraj mevoj, konkoj kaj marherboj.

La pentraĵoj de *Ho Song* prezentitaj en "*Azia paletro*" radias freŝan, pastelan koloraron de oleaj

farboj surtoligitaj per precizaj penikmovoj. De tempo al tempo li eksperimentas per olepentaĵoj, donante al ili grajncan strukturon, kaj volonte li uzas ankaŭ akvarelon. En la verkaro de la pentristo troviĝas ankaŭ multaj portretoj kaj nudpentaĵoj, sed al Sisak per ĉi tiu ekspozicio *Ho Song* prezentigis per pejzaĝoj, marinoj, objektoj, kaj per unu portreto pentrita per akrilo.

KIAM FOJE MI FORIROS

(Kada jednom odem)

✍️ Marija Horžinek

Kiam foje mi foriros, malantaŭ mi restos spuro de mia vivo: enpuŝita en la teron kaj en la malnovan domon, detruitan pro la fero kaj militaj suferoj.

Kiam foje mi foriros, kaj foriri oni devas, restos larmoj pro la spertitaj suferoj kaj lumo de rideto, radianta esperon.

Kiam foje mi foriros, egale kiam kaj kien, restos malantaŭ mi parto de mia animo. Ĝi vagos tra la kampo, riverbordo, infanaĝaj padoj kaj malnova urba tombejo.

Kiam foje mi foriros kaj mi ne plu ekzistos, mi restos kaŝita en kaliklo de printempa floro, en la tiliaodoro, en la branĉaro de la ĝardena pomarbo peziĝinta pro la aŭtunaj fruktoj, en la verdaĵo de la korta bukso, en la senfinedo de vasto kaj lazuro de la ĉielo.

Kiam foje mi foriros, (kaj tio estas neevitebla), mi restos konservita en la fajruja flamo, kvazaŭ hejma spirito, neŝarĝita per leĝoj de tempa daŭro, kaj mi gardos la hejmajn valoraĵojn.

Kiam foje mi foriros (kaj tion mi ne timas), mi restos maldormi super ĉio kion mi amis kaj amas, ĉar la amo estas senmorta.

Kaj eble iu, kiu ankaŭ min amis, rekonos mian spuron kaj donacos al mi benon de sia memoro, kaj tio signifos ke mia foriro tamen ne estis definitiva kaj eterna.



Nataša Dorosulić legas la rakonton "*Kiam foje mi foriros*" el la libro de Marija Horžinek.

KIAL LA MOTILONOJ ESTAS ANKORAŬ AGRESEMAJ



"Kial la Motilonoj estas ankoraŭ agresemaj" estas la kvina ĉapitro de la vojaĝpriskriba libro "De Patagonio ĝis Alasko", verkita serblingve de la konata Esperanta verkisto Tibor Sekelj. Ĉi-jare estis lanĉita la projekto de komuna tradukado de tiu ĉi atentokapta tekstaro. Plurpersona grupo de tradukantoj jam tradukis grandan parton de la verko, kaj la celo de "Grafokom", kiu eldonos la libron, estas aperigi ĝin antaŭ la Universala Kongreso en Bonaero (Argentino), somere de 2014. Tibor Sekelj estas grava persono por la argentina Esperantomovado, ĉar li estis kunfondinto de Argentina Esperanto-Ligo. Li, krome, diskonigis Esperanton tra la tuta sudamerika kontinento, kaj do ĉu ekzistas pli bona okazo ol prezenti lian verkon havanta karakterizan titolon ĝuste en Argentino?

La ĉi-kunan ĉapitron ni publikigas kun afabla permeso de s-ino Erzsébet Székely, la vidvino de la aŭtoro.

La preso de Venezuelo de tempo al tempo publikigas novaĵoj pri la indiana tribo de Motilonoj (*Motilonos*) kiuj vivas ne malproksime de la urbo Marakaibo (*Maracaibo*) kaj neniel volas akcepti la amikecon de la blanka homo. La jarcentaj bataloj inter la enmigrintaj Hispanoj kaj la indiĝenoj lasis profundan postsignon en la memoro de la Motilonoj.

Do ne estas miraklo, ke ne nur la rakontoj pri la bataloj kaj la reciproka krueleco transiĝas de generacio al generacio eĉ en ilia simpla medio, sed tiuj malamikecoj renoviĝadis de tempo al tempo, preskaŭ ĝis antaŭ nelonge.

Multaj batalemaj triboj unu post la alia eniris en la orbiton de la blankhoma civilizo. Eĉ Ŝavantoj (*Xavante*), la timindo de la savanoj kaj ĝangaloj de Matogroso (*Mato Grosso*), dum la sesdekaj jaroj de

tiu ĉi jarcento* packontraktis kun la delegitoj de Rio-de-Janeiro (*Rio de Janeiro*). Sed la Motilonoj ankoraŭ persistas en sia "sovaĝeco".

Pri la kialo de tiu stato ne necesas multe paroli. Pri ilia vivo mi ne scias pli multe ol aliaj, ĉar kvankam mi venadis preskaŭ ĝis la rando de ilia teritorio, mi ne kontaktis kun ili mem. Sed pri la demando kial ili ankoraŭ ne konsentis adaptiĝi al nia mondo de la dudeka jarcento mi povus ion diri, ĉar hazarde tiel okazis, ke ankaŭ mi mem estis parte enmiksita en ilian rilaton al la ĉirkaŭaĵo. Mi opinias ke tio estas rakontinda.

Ili ne respektas sutanon

Aviadistoj jam dum la kvindekaj jaroj sukcesis foti de la ĉielo vilaĝon de Motilonoj. El tiu epoko datas ankaŭ la epizodo pri

misiisto kiu provis ek rilati kun ili, kaj kiun la preso detale publikigis.

Tio okazis en 1950. Mi loĝis tiam en Marakaibo kaj sekvis kun intereso la obstinan laboron de katolika misiisto kun longa barbo

kaj bruna sutano, kiu decidis je iu ajn kosto amikiĝi kun la Motilonoj. Li kreis planon, kaj mi havis la okazon aŭskulti el lia propra buŝo pri liaj esperoj je la sukceso de la entrepreno.

La rezulton de lia klopodo mi poste sekvis en la gazetaro. Kelkajn tagojn sinsekve li superflugis aviadile indianan vilaĝon. Li fotadis la indiĝenojn kaj ĵetadis paraŝute sakojn da diversaj donacoj, de tranĉiloj kaj ĉemizoj ĝis kolieroj kaj alumetoj. Dum la unuaj tagoj la Motilonoj kaŝis sin antaŭ la bruanta birdo, kaj la objektojn ili kolektadis dum mallumo. Nur poste ili iom kuraĝiĝis kaj, kiam el malproksimo ekaŭdiĝis la bone konata zumado de la donacema monstro, nudaj viroj, virinoj kaj infanoj eliradis al maldensejo inter la kabanoj kaj malsvingadus al nevidebla donacanto.

La monaĥo povis konstati ke la Motilonoj ne estas blondaj, kiel la legendo eĉ nuntempe persiste asertas. Sed tie kaj tie inter ili troveblas kelkiu helhara.

Iu gazeto publikigis foton de granda komunuma domo de Motilonoj kaj esprimis la supozon, ke la loĝantoj de tiuj domoj verŝajne loĝas sur du-tri etaĝoj unuj super la aliaj, ĉar cetero oni ne povus kompreni la kialon por konstrui tiel altajn domojn. Tia supozo havas nenian realan bazon. Mi mem loĝis en similaj kabanoj, kvankam ne long- sed rondformaj, ĉe la Tuparioj (*Tuparis*), en Matogroso. La domo estis 16 metrojn alta, kaj la tuta spaco servis por aerumado. Ĉiu familio konservadas konstantan fajron sur sia fajrujo, kaj la fumo rapide plenigus la komunan domon se ĝi ne estus tiom alta. Ĉi-maniere la fumo malrapide eliras tra la palmaj folioj de la larĝa, duonpilkoforma tegmento.

Al la malsvingado la monaĥo iutage respondis svingante tra la fenestro de la helikoptero. Poste li kontente frotradis la manojn.

La venontan tagon la misiisto ĵetis sian foton pligrandigitan al la naturaj dimensioj. Momenton poste li vidis ke la indiĝenoj tenis la foton en la manoj kaj vikle diskutis pri ĝi.

La momento venis, ekpensis la monaĥo. La venontan tagon li provizis sin per donacoj kaj alteriĝis per helikoptero meze de la vilaĝo de la Motilonoj.

Tuj post kiam li aperis en la pordo, la indiĝenoj alkuris.

La monaĥo etendis la brakojn, havante krucon en la dekstra mano.

Sed la Motilonoj kvazaŭ ne rimarkus tion. Ili elpafis siajn sagojn, ĵetis la lancojn kaj sturmis tenante siajn klabojn, per kiuj ili mortigis la bonvoleman misiiston.

Tiu ĉi malsukceso estis multvorte komentita en la venezuela preso. Tiutempe mi publikigis serion da artikoloj pri miaj esploradoj en Amazono (*Amazonas*), do iu ĵurnalisto petis min diri ion pri la Motilonoj.

Mi parolis pri la "elprovitaj metodoj" de proksimiĝo al batalemaj indiĝenoj.

La sekvontan tagon iu generalo de la venezuela armeo vizitis min. Li estis vestita civile.

– Kion vi volis diri pri tiuj "elprovitaj metodoj"?

Kaj antaŭ ol mi povis ion respondi, li daŭrigis:

– Ekzistas nur unu metodo, bone elprovita dum jarcentoj. Ni sendos unu armean batalionon kun mitraloj. Mi garantias al vi, ke ni solvos la problemon de la Motilonoj unufoje por ĉiam.

Liaj okuloj brilis tute konvinke. La generalo ne ŝercis, sed malkovris al mi siajn realajn planojn.

– Ni devas ekstermi ilin. Ni devas forigi de ni tiun hontindaĵon meze de la dudeka jarcento.

Mi provis klarigi al mia kunparolanto ke tiu metodo

de solvado de la problemo neniel honorigus la nacion, sed eble kaŭzus eĉ pli grandan makulon sur ĝia honoro ol la ĉeesto de la Motilonoj.

Iom post iom mia vizitanto komencis interesiĝi pri miaj spertoj en la brazilaj praarbaroj, pri ĉio kion mi vidis kaj lernis en la praarbaraj stacioj de la "Servo por protektado de Indianoj", la institucio kiun fondis kaj gvidis dum duona jarcento la generalo Rondon.

Je lia postulo mi komencis detale klarigi la plej konvenan kaj la plej sekuran manieron por konformigi al nia civilizo tian desapontitan kaj bataleman tribon.

Mi klarigis ke tio estas longa kaj pacienco laboro. Ĝi konsistas el ok etapoj.

La unua etapo. Dekhoma skipo finkonstruas por si domon ĉe la riverbordo prezentanta la limon de la teritorio de la Motilonoj. Tie ili loĝiĝas kaj provas organizi por si normalan vivon.

Per boato ili transiras al la alia riverbordo, la sama ĝis kiu venas Motilonoj, senarbigas parton da grundo, kaj sur ĝi semas maizon kaj maniokon, la plantojn kiuj apartenas al la ĉefaj nutrovaroj en Brazilo.

Kompreneble, la indiĝenoj ekde la komenco observas kion la venintoj faras, kaj kelkfoje eĉ dum la enkampa laboro ili nerimarkite kaŝaliras. Tial estas dezirinde labori sub protekto de forta gardistaro, kaj ne estus superflue porti kaskon kaj subĉemizon el nepenetrebla tapira ledo.

Tra la fenestro de la dometo ofte aŭdiĝus gaja muziko de la radio, kaj sana rido de ĝiaj loĝantoj.

Tuj post kiam la maizo kaj manioko maturiĝos, la indiĝenoj proksimiĝos kaj ŝtelos la fruktojn.

La skipanoj rigardos ilin tra la fenestro trans la rivero, kun ridetoj sur la vizaĝoj.

La dua etapo. Ses

monatojn poste, okaze de nova rikolto, la membroj de la skipo kolektados mem de tempo al tempo la fruktojn en korbojn kaj lasados ilin en la kampo por la Motilonoj, kune kun iuj donacoj, ekzemple hakiloj, tranĉiloj kaj ornamaĵoj.

La indiĝenoj malkovros tion kun surprizo. Ili prenos la fruktojn kaj la urbajn donacojn, kaj siaflanke ili plukos ĉion kio estas duonmatura.

La membroj de la skipo ridetos el la fenestroj kaj mansvingos al ili. Se ili povos ekscii kiel en ilia lingvo oni diras "amiko", ili rediros ĝin ĉiun fojon kiam ili vidos la indiĝenojn.

Iom post iom la Motilonoj rimarkos, ke ili fakte ne ŝtelas alies elkreskaĵojn, sed ke ili kolektas ion kion oni semas ĝuste por ili. Ĉar la skipo prenas nenion por si mem el tiu kampo, kaj ne protestas kiam la indiĝenoj forportas la fruktojn.

Tiu ĉi malkovro kreas ĉe ili scivolemon kaj simpatian por la venintoj.

La tria etapo. Ses monatojn poste estos nova semado. Iun tagon kiam ili venos al la kampo, la Motilonoj rimarkos sur ĝi grupon da venintoj sidantaj ĉirkaŭ fajro kaj rostantaj maniokon. Ili diskuros, sed anstataŭ ol persekuti ilin, la venintoj gaje ridos al ili. Tiam ili retiriĝos trans la rivero, kaj la Motilonoj iom poste revenos por kolekti la fruktojn. Ili trovos amasigitan la ĵus rostitan maniokon kaj salon en poteto.

Kelkajn tagojn poste ĉi tio ripetiĝos, eble kun la diferenco ke la Motilonoj ne diskuros, sed akceptos el la manoj de la skipanoj po unu poteton da salo. Nur tiam ili forkuros, akompanitaj per amika rido.

Singarda sed trankvila kaj ĝoja sinteno de la venintoj faros fortan impreson al la indiĝenoj.

La kvara etapo. La Motilonoj jam kutimiĝis trovi sur la kampo grupon da gajaj junuloj,

proksimiĝi al ili kaj preni iujn donacojn el iliaj manoj. La plej kuraĝaj eĉ konsentis sidiĝi sur arbostumpon apud ili, kaj manĝi kune kun ili.

En la **kvina etapo** la Motilonoj petas pli da salo, kolieroj kaj aliaj objektoj montrante al la ĝangalo, dirante ke tie ili havas virinojn kaj infanojn.

La venintoj pretas doni ion al ili, sed nur se ili mem venas ĉi tien. Tiam komencas venadi tutaj familioj. Ne facilas kontentigi tiom da etenditaj manoj, sed la ĉeesto de la familioj estas grava paŝo antaŭen.

La sesa etapo. Iu el la plej spertaj jam povas interkomuniki kun la indiĝenoj. Li klarigas ke li nun vidas ke ili estas multaj, kaj ke ili ŝatus nutri ilin ĉiujn per maizo kaj manioko. Pro tio ili decidis krei pli grandan kampon.

La novaĵo estas akceptita entuziasme.

Sed la problemoj estas ke la venintoj estas malmultaj kaj ili ne povas tiom labori. Ĉu ili volus iom helpi al ili? Ne atendante la respondon li donas po unu belan novan maĉeton en la manojn de ĉiu viro, kaj laboras kune kun ili senarbigante la arbaron. Ĝis la vespero la amplekso de la kampo estas duobligita.

En la **sepa etapo** tiu laboro pludaŭras, kun la ideo ke le kampo povus esti ankoraŭ iom plivastigita. Por ke la Motilonoj ne devu reveni ĉiutage al sia vilaĝo, oni proponas al ili konstrui kune kun la skipanoj komence unu komunan barakon, kaj poste malgrandajn familiajn dometojn en du longaj vicoj.

La arbaro estas senarbigita, la traboj hakataj, kaj en la komuna laboro konstruiĝas la dometoj. La Motilonoj en ili loĝados partatempe, dum la senarbigado, semado aŭ rikoltado. Poste ili revenados al siaj vilaĝoj. Ili fakte havos du hejmojn.

La konfido estas establita.

La indiĝenoj en malgrandaj grupoj transiras al la alia bordo, konatiĝas kun la familioj de la skipanoj, kun iliaj dombestoj, lito, magnetofono, radio kaj aliaj mirindaĵoj de la blanko homo.

En la **oka etapo** oni preparas festojn en la nova motilona vilaĝo dum periodo kiam oni ne havas enkampan laboron. Oni ligas ilin al tiu ĉi loko por ĉiam. Ĉi tien venas ankaŭ aliaj blankuloj por konatiĝi kun la indiĝenoj, por kune kun ili labori kaj por sammaniere dividi kun ili manĝaĵon kaj konstruas.

Samtempe oni konstruas ankoraŭ du-tri similajn staciojn apud la "landlimo" de la teritorio kiun la indiĝenoj konsideras sia, kaj oni ripetas la saman sistemon, nun jam en pli rapida ritmo, kun mallongigitaj tempolimigoj, ĉar la unua sukcesa entrepreno diskoniĝis tra la tuta tribo. Verdire, ĉiam troveblas malkonfidemaj uloj, precipe inter pli maljunaj indiĝenoj, kiuj provos transigi sian malkonfidon al la pli junaj. Tial la procedo ankaŭ estonte devos esti tre atentema, por ke ne aperu iu dubo aŭ okazu abrupta ago, kiu povus detrui la tutan klopodon kaj ĉiujn ĝistiamajn sukcesojn.

Mia kunparolanto atente aŭskultis mian eksplikadon. Fine li havis nur unu rimarkon:

– Sed homo, tiu procedo povus daŭri eĉ plurajn jarojn, eble eĉ tutan jardekon, kaj kion oni gajnos per tia projekto, supozante ke ĝi estos plene sukcesa? Ni gajnos la pacon kaj la simpatian de manpleno da batalemaj sovaĝuloj!

Post tio eksilentis mia generalo. Sed ŝajnis al mi kvazaŭ li perforte retenus sur la lipoj ankoraŭ unu frazon, kiu restis neeldirita:

"Kaj kial ĉio ĉi, se mitralo povas solvi tion pli rapide kaj pli senriske?"

Kompreneble, Rondonoj ne naskiĝas ĉiupaŝe.

*Tradukis:
Divo Pulitika*

AL DEC DONACITA KOLEKTO KONSISTANTA EL 800 FOTOJ

La graveco de Dokumenta Esperanto-Centro en Ĝurđevac kiel arkiva kolekto kreskas ĉiutage. Tiun gravecon rekonis ne nur kroataj esperantistoj kiuj al ĝi konfidis siajn Esperantaĵojn, sed plioftiĝis kvanto da materialoj venantaj el aliaj landoj. Inter tiuj unu lastatempe ricevita donaco, havas apartan gravecon. Pakajon kun ĉirkaŭ 800 paperaj fotoj sendis al DEC **Tomasz Chmielik** el Ŝvidnik (Pollando). Temas pri fotoj el la postlasaĵo de

la geedzoj **Jerzy Fornal** kaj **Zofia Banet-Fornalowa**, kiuj donis grandan kontribuon al la Esperanta teatro, sed ŝuldigis la Esperantomovadon ankaŭ per siaj multflankaj aktivecoj. La tutan kolekton tre afable al DEC donacis ilia filino **Tamara**, kaj s-ano **Chmielik** bonvolis servi kiel peranto.

La ricevita foto-materialo gravas ne tiom pro la malnoveco de la senditaj fotoj, ĉar temas pli-malpli pri la periodo de lastaj 30-40 jaroj,

 **Josip Pleadin**

sed ĝia valoro troviĝas en al fakto, ke estas fotitaj multaj teatraĵoj kaj aranĝoj kiujn partoprenis la geedzoj Fornal.

DEC prioritare skanos la tutan kolekton, katalogos ĝin kaj disponigos pere de interreto al la esperantista publiko, celante kompletigi informojn pri la aranĝoj kaj personoj kiuj troviĝas sur la fotoj.


GAJULETOJ VIN SALUTAS!

Skribante pri la unika gaja infana kantgrupo en Kroatio mi devas prezenti mian artikolon ekde la vera komenco. Kun la gvidantino de la grupo, la instruantino **Silvija Fostaĉ**, mi konatiĝis antaŭ dek jaroj en **Kostrena**, la bela apudmara urbeto kie okazis konkurso pri scio de Esperanto por elementlernejaj kaj mezlernejaj lernantoj. Ĉar ni ambaŭ havis identajn interesojn kaj ŝatojn, Esperanton kaj kantadon, ni komencis kunlabori.

Unue ni preparis malgrandan programon kiun ni prezentis en la bieno **Zrno** de nia esperantistino **Zlata Naniĉ**. Sekvis la sukcesa sinprezento en la koncertejo **Vatroslav Lisinski** okaze de la centjariĝo de Esperanto en Kroatio (2008), kie ili prezentis du kantojn akompanitaj de du gitaristoj, **Neven Mrzleĉki** kaj **Željko Krušlin**.

Poste ni vizitis Osijek, kie la infanoj kantis kaj Esperante kaj kroate okaze de la centjariĝo de Esperanto en tiu slavonia urbo. Muzike akompanis ilin la instruistino **Silvija Fostaĉ** per harmoniko.

 **Marija Jerković**

 **Jozo Lovrić**



La programo de "Gajuletoj" en Bjelovar ĉi-jare

Ĉi-jare, okaze de la festo de urbo Bjelovar, la tieaj esperantistoj preparis Esperantan programon, kiun per la Esperantlingvaj kantoj "Bela estas Zagorje la verda" kaj "Kiam estas vi kontenta" plibeligis ankaŭ la gaja infana kantgrupo **"Gajuletoj"** el Zagrebo.

Kaj nun alproksimiĝas

Zamenhofa tago dum kiu **"Gajuletoj"** denove kantas kun sia instruistino, kaj por kiu ili preparas novan programon. Ĝi estu surprizo!

"Gajuletoj" konsistas el 20 geknaboj, kiuj aĝas inter 7 kaj 10 jaroj, kaj venas el Elementa lernejo **Davorina Trstenjaka** el Zagrebo. Ilia entuziasma instruistino estas esperantistino **Silvija Fostaĉ**.

ETA REMEMORO PRI “ZORGULO”

 Radenko Milošević

25 jaroj
post la morto
de Josip Vajdlih
(Weidlich) Zorgulo

*“La morto estas en la forgeso, kaj ne en la fakto de la forpaso mem.
Homo estas vere morta, kiam neniu rememoras lin.”*

En la menso de mia generacio de montgrimpantoj kaj esperantistoj, aparte el la societo “*Naturamiko*”, ĉe la mencio de la nomo de *Joža – Zorgulo*, tuj reviviĝas multaj bildoj kaj rememoroj. Li nomis min “mia Esperanto-adepto”, kaj instruis al mi Esperanton laŭ la lernolibro de *Dušan Maruzzi*, pro kio mi devas konfesi, ke la ondoj de rememoroj min aparte tuŝas.

Joža estis korifeo de esperantisteco en la naturamika movado, kies emblemo prezentas du manojn kun blanka kaj blua manikoj, kune tenantaj la blujajn kvinpetalajn florojn de la laborista montgrimpa, turisma kaj esperantista societo “*Naturamiko*”. Lia klopodo por laboristaj kaj naturamikaj celoj estis la esenco de ĉio alia en lia vivo. Sian grandan kontribuon li donis al la organizado de *Sennacieca Asocio Tutmonda* (SAT), al la montkabano de “*Naturamiko*” sur Glavica, situanta ĉe la okcidenta deklivo de la zagreba monto *Medvednica*, kaj al la *Laborista biblioteko* en Zagrebo, kiun li gvidis kaj prizorgis tre serioze, kaj kiun li riĉigis per Esperanto-kolekto.

Li estis, laŭ nia takso, unu el la maljunuloj en la societo “*Naturamiko*”, kvankam tiam li estis proksimume kvardek- aŭ kvindekjara. Li (kaj ankaŭ aliaj societanoj) bonvenigis nian grupon, ĉar ni estis dudekjaraĵoj, kaj inter la membroj de *Kroata montgrimpa societo* cirkulis la onidiro, ke ni alportis “novan spiriton” al la malnova kaj eĉ eksterlande konata montgrimpa societo, havanta longan tradicion. La 30-40-membra grupo de junuloj, por kiuj ne plu ekzistis ebleco



labori enkadre de la organizo de *Kroatia Ruĝa kruco*, post la aliĝo al la societo “*Naturamiko*” trovis novan ŝancon por resti kune kaj daŭrigi la aktivecojn de la iama ruĝkruca “terena unuo” en la nova societo.

La societo “*Naturamiko*” permesis uzi al la iamaj ruĝkrucaĵoj sian modestan ejon en la kelo de la *Laborista domo* en Zagrebo. Kaj ne nur tion! *Joža*, kiu kun *Franjo Vokoun* kaj multaj aliaj zorgis pri diversaj societaj aferoj, tuj donis al ni monon por niaj celoj. Ni aĉetis novajn skiojn kun modernaj suprenkurbitaj pintoj. La grupo propraidee desegnis kaj konstruis tendojn kaj prilaboris detalojn, por ke la tiama fama sporta entrepreno produktu tendojn.

Evoluis ampleksaj aktivecoj, kiujn plenkore subtenadis nia *Zorgulo*. La grupo rebruligis la flamon de gloro en la societo de antaŭmilitaj montgrimpoj kaj esperantistaj societoj. La societanoj instigis nin partopreni en diversaj eventoj en Kroatio kaj en eksterlando. Unu el tiuj estis la partopreno en la respublika konkurado en la t.n. “alpaj disciplinoj”. Kiam ni venis al la startejoj, aŭdigis morkrioj, ĉar ni estis ekipitaj per malnovaj ŝuoj kaj vestaĵoj, el kiuj aparte okulfrapaj estis la malnovaj “puffpantalonoj”. Niaj rezultoj efektive estis modestaj, sed vira kaj virina teamoj kelkfoje venkis en la montgrimpa orientada konkurado per kompasoj en la montaro. *Joža* foje proponis ke niaj membroj konkeru la plej altan pinton de *Montenegro* sur la monto *Durmitor*, kie oni trovu spurojn de la naturamika ekspedicio grimpinta tie antaŭ

ANONIMA SUBVENCIO EL SVISLANDO

 Radenko Milošević

Ke ekzistas homoj pretaj subteni niajn agadojn per konsiderinda subvencio, konfirmas ankaŭ la anonima donacinto el *Svislando*, kiu komence de novembro ĝiris al ni la sumon de *1.000 eŭroj*. La sumo venis al konto de *Dokumenta Esperanto-Centro* kiu jam unu jaron plenumas organizajn kaj eldonajn aferojn de *"Zagreba Esperantisto"*. En sia klarigo, la donacinto esprimis la deziron resti anonima, kaj la sumon

li donacas por kovri la eldonkostojn de *"Zagreba Esperantisto"* ĝis la fino de la jarkolekto 2013.

Kvankam li ne estas regula legato de nia gazeto, li havis la okazon konatiĝi kun ĝia enhavo, kiun li taksas tre valora. La donacinto esprimas sian kontenton, ke *UZE* entreprenas eldonadon de papera gazeto, kaj ke la rezulto de tiu laboro estas mirinde bona kompare kun aliaj gazetoj de Esperantujo. Li deziras pliajn sukcesojn al la

eldonantoj, kaj invitas ankaŭ aliajn esperantistojn subteni la klopodojn de la redakcio, kies plurfojoj invitoj pri financa helpo motivigis lin por subvencii la gazeton.

La redakcio plej kore dankas pro la malavara helpo, akcentante ke sian financon helpon al nia gazeto ĉi-jare denove donis ankaŭ la fabriko de fajroestingiloj *"Pastor"*, kiu donacis la sumon de *4.000 kunaoj*.

ZAGREBO FINANCIS PROJEKTON DE UZE

 Radenko Milošević

Kiel ni skribis en la pasinta numero, *Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj* (UZE) eldonis preskaŭ 1000-paĝan kroatlingvan

kvarvoluman memuarverkon de sia membro *prof. Nikola Turk*. Tiu projekto ricevis financon subtenon de *Urbo Zagrebo*. La *Urba oficejo por socia protekto kaj invalidaj*

personoj atribuis al tiu projekto la sumon de 10.000 kunaoj. La tiucelan decidon de la 25-a septembro 2013 subskribis la urbestro de Zagrebo *Milan Bandić*.

la dua mondmilito. La ekspedicio estis realigita, same kiel aliaj grimpadaj instigitaj de *Zorgulo*, ekzemple trans la mezbosniaj montaroj kaj la lago de Jablanica, kiu finiĝis per boatado laŭ la rivero *Neretva* ĝis *Mostar*.

La *Esperatista sekcio* kiu konsistis el proksimume dekkvin membroj ankaŭ kontribuis al la famo de la societo. Interalie, la esperantistoj partoprenis en 1962 en la viena kunveno de esperantistaj naturamikoj, kie ili amikiĝis kun la multjara funkciulo de naturamika movado *Max Finkenzeller*.

Ĉi tiu rememoro ne estus kompleta sen kelkaj biografiaj datumoj pri *Josip Vajdlih*, ĉerpitaj el la "Biografia leksikono de

kroataj esperantistoj" (J. Pleadin, 2002). *Josip Vajdlih* naskiĝis en *Novi Marof* en februaro 1907 kaj mortis en *Zagrebo* decembre de 1988. Laŭfakte li estis elektrikisto, sed li laboris kiel bibliotekisto en la *Laborista biblioteko en Zagrebo*, ĝis la emeritiĝo. Li estis kunfondinto de *Kroatia Esperanto-Ligo* kaj de *Esperanto-societo "Bude Borjan"* en *Zagrebo*. Kiel administranto kaj kaskisto de *Jugoslavia Esperanto-Federacio* kaj la revuo *"La Suda Stelo"* li funkciis ĝis 1953. Li estis peranto de *SAT* ĝis 1963. Li merite la *Laborista biblioteko* en *Zagrebo* kreis Esperanto-fakon kun ĉirkaŭ 600 Esperanto-libroj. Oni povas trovi liajn artikolojn en *"La Suda Stelo"*, *"Sennaciulo"*

kaj *"Jugoslavia Fervojisto"*. Li estis komitatano de *Fervojista Esperanto-Societo* en *Zagrebo*, de *Kroatia Esperanto-Ligo* kaj de *Jugoslavia Esperanto-Federacio*. En 1953 li estis LKK-ano de Universala Kongreso de Esperanto okazinta en *Zagrebo*.

Damir, la filo de *Joža*, karesnomita *Daĉjo*, estis denaska esperantisto, sed li neniam aktiviĝis en la naturamikaj aŭ esperantistaj rondoj.


Fine de ĉi tiu rememoro, oni devas kun bedaŭro konstati, ke malgraŭ lia multjara, fervora kaj sindona laboro kaj vivo, oni povas pri li trovi nenion en la arkivo de *SAT* aŭ en la retejo de *Kroatia montgrimpa unuiĝo*

“ODO AL SAMARKANDO” EN 62 LINGVOJ

La kalendaro de Uzbekio enhavas multe da festoj, sed ekzistaj festoj nemarkitaj en la kalendaro, kiuj je specifa maniero proksimigas homojn kaj kunigas ilin en unu grandan, multetnan kaj amikan familion. La *Tago de urbo Samarkando* apartenas al tiuj solenaj datoj. Por marki tiun urban feston aperis la nova poemlibro *“Odo al Samarkando”* de rusia poetino *Irina Aleksejeva*. Ĝi estis oficiale lanĉita la 17-an de oktobro 2013 en la Teatro de Historia Kostumo “El Merosi” en Samarkando, Uzbekio. Tiu ĉi multlingva eldonaĵo estis publikigita de la konata moskva Eldonejo de la revuo *“Junost”*.

La poetino *Aleksejeva* donacis sian poemon *“Odo al Samarkando”* al la Muzeo de Paco kaj Solidaro kiel kontribuon por ĝia internacia projekto *“Samarkandiana”*. Tiu ĉi poezia himno al la antikva urbo havas mirindan sorton: ĝi disflugis tra la

 *Anatoli Ionesov*



mondo kaj estas tradukita en multajn lingvojn. La libro prezentas 71 tradukojn de *“Odo al Samarkando”* al 62 lingvoj, inkluzive de po du versioj fare de diversaj aŭtoroj en

naŭ lingvoj. La poemon tradukis 70 poetoj kaj verkistoj el 50 landoj. La kroata lingvo estas reprezentita per la traduko de *Josip Pleadin*.

Ĉi tiu unika antologio estas rezulto de preskaŭ tri-jara intensa laboro. La tradukojn kolektis kaj preparis por publikigo la redaktoro kaj kompilinto de la libro *Anatoli Ionesov*, la aŭtoro kaj kunordiganto de la projekto *“Samarkandiana”* kaj fondinto de Samarkanda Pacmuzeo (Uzbekio). Substrekindas, ke en tiu ĉi transkultura projekto la gravan rolon ludis la internacia lingvo Esperanto kiel efika lingvo-peranto kaj kiel siaspeca lingva ponto inter diversaj lingvoj kaj kulturoj. Ja, grandparte ĝuste dank’al Esperanta traduko de *Vladimir Masalkin* (Rusio) komenciĝis la vojaĝo de la Odo tra la mondo. Ne hazardas, ke inter la tradukintoj ĉirkaŭ trideko estas esperantistoj kaj la vortoj Esperanto kaj esperantisto aperas en la libro 81-foje.

Kronach situas en la nordo de la germana federacia lando Bavario. Kadre de kunveno de gesamideanoj el kelkaj urboj de tuta Bavario, la 26-an de oktobro estis festita la 100-jara ekzisto de Esperanto en la urbo. Sur la porokaza foto troviĝas la partoprenintoj: tute maldekstre la arkivisto de la loka grupo *Gosbert Gehlert*, tuj apud li staras la juna prezidanto de la Germana Esperanto-Asocio, *Sebastian Kirf*, la plej alta en la posta vico estas la ĉefa parolanto de la bavaraj esperantistoj, *d-ro Bernd Krause*, kaj antaŭ li (kun la kravato) estas *Armin Grötzner*, la parolanto de la Kronach-a grupo. Sekvas sinjorino *Brunhilde Lorenz*, la ĉefa interpretistino inter la partneraj urboj Kronach kaj la bretonia Hennebont.

CENT JAROJ DE ESPERANTO FESTITA EN KRONACH

 *Armin Grötzner*



KALENDARO

La 10-a kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio okazos en Rijeka (Kroatio) inter la 6-a kaj 11-a de julio 2014. Pliaj informoj ĉe la retejo <http://eeu-kongreso.webnode.com//>

La 99-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Bonaero (Argentino) inter la 26-a de julio kaj 2-a de aŭgusto 2014. Pliaj informoj ĉe: <http://www.esperanto.org.ar/uk2014/>

La 47-a ILEI-konferenco okazos en Montevideo (Urugvajo) inter la 19-a kaj 25-a de julio 2014.

KERo en KUBO

Inter la 12-a kaj 16-a de marto 2014 okazos KERo (Kuba Esperanto-renkontiĝo) en Kampadejo "Dos Hermanes" en Pinar del Rio (Kubo). Aligkotiĝoj por eksterlandanoj 180,00 eŭroj. Pliaj informoj kaj aliĝilo troveblas ĉe: www.esperanto.cult.cu. Por demandoj, bv. skribi al la retadreso: kubesp@enet.cu

GRUPE-17

 Adam Wilkus

GRUPE-17 (Gliwice'a Rendevuo de Uzantoj kaj Praktikantoj de Esperanto) okazis de la 8-a ĝis la 11-a de novembro en Gliwice, sudokcidenta Pollando. Ĉi-foje venis geesperantistoj el Ĉeĥio, Ukrainio, Brazilo kaj Pollando. Plaĉis al mi la belaj koncertoj (de *Wojtek* t.e. *Adalberto Lawnikowicz* el Wrocław kaj de koruso *UTA* el silezia urbeto Jastrzębie Zdrój), prezentado de

fotoj kaj filmoj (vojaĝ-, pilgrim-, kongres- kaj geedziĝfesto- raportoj kiuj temis pri diversaj landoj). Por mi speciale interesaj estis filmoj pri Brazilo kaj fotoraporto pri perpieda sola pilgrimado de d-ro *Adam Leżak* laŭ Jakoba vojo el pola urbo Opole tra Ĉeĥio, Germanio, Francio kaj Hispanio al Santiago de Compostela. Tre plaĉis al mi koncerto de *Wojtek* kiu belege ludis gitaron kaj prezentis du amuzajn kaj kortuŝajn kantojn pri vivo. Interesa estis vizito al karbominejo *Guido* en proksima urbeto Zabrze (ni estis pli ol tricent metroj sub la tersurfaco kaj renkontis spiriton de la minejo tie!). Multaj ĝuis loterion kun premioj kaj vesperan bierumadon en restoracio

kaj en junulara gastejo. Kelkaj partoprenantoj vizitis renovigitan palmodomon kie kreskas belaj plantoj kaj vivas diversaj bestoj, interalie fiŝoj. Vizitindis ankaŭ plej alta en la mondo ligna turo, kie troviĝis fama radiostacio kaj kiu estas bele lumigata dum nokto (ĝi ŝanĝas sian koloron kelkfoje). La aranĝo daŭris ĝis lundo, kiam en Pollando oni festas tagon de sendependeco.

Post mia fotoprezentado pri Kroatio okazis kvizo kaj al tiuj partoprentintoj kiuj respondis ĝuste mi disdonis premie la 3-an numeron de "Zagreba Esperantisto" eldonitan ĉi-jare, kiu enhavas interalie raportojn pri Adriatika Feriado.



MORESKO



 Redakcia kompilo



Moresko (kroatlingve: moreška) estas romantika bataldanco kun glavoj, kiu devenas el la 12-a aŭ 13-a jarcento, kiam ĝi aperis en la regiono de Mediteraneo. Kvankam malsamajn formojn de tiu danco oni konis en diversaj landoj, en Kroatio ĝi konserviĝis en specifa formo en la insulo **Korčula** ĝis nuntempo. Laŭ opinio de historiistoj, moresko venis al **Korčula** en la 16-a jarcento el Hispanio, tra suda Italio kaj Dubrovnik. Dum la pasintaj jarcentoj ĝi malaperis en plej granda parto de Mediteraneo, dum en **Korčula** ĝi lasis siajn profundajn radikojn, kaj en sia nuntempa formo ĝi estas atrakcia danco, unika en la mondo.

La nomo **moresko** devenas de Maŭroj (Moriskoj), laŭ kiuj en la hispana lingvo formiĝis la adjektivo **morisco** kaj en la itala **moresco**, respektive bataldanco rilata al Maŭroj - Moriskoj.

Laŭ supozoj la unua moresko estis ludita en la hispana urbo **Lerida** en 1150, kiel reminiscenco pri la forpelo de Maŭroj. Similaj dancoj estis ludataj en la tuta katolika Eŭropo ĝis la fino de la 14-a jarcento.

La unuaj informoj pri moresko en Kroatio datas el la jaro 1273 en **Trogir**. En **Korčula** ĝi estas ludata ĉiujare ekde la 15-a jarcento.

Laŭ sia enhavo, moresko el **Korčula** estas batalo por fraŭlino, pro kio evidentas ke ĝi havas radikojn en la tradiciaj mediteraneaj rakontoj kaj legendoj, el kiuj la plej konata estas

tiu pri la Troja ĉevalo, kvankam en la moresko de **Korĉula** la rolantoj estas aliaj.

La rakonto de moresko estas la jena:

Moro, la filo de la **Nigra Reĝo**, ŝtelis al la **Blanka Reĝo** la fraŭlinon kiu nomiĝas **Bula**. Post mallongaj dramaj dialogoj inter **Moro** kaj **Bula**, kaj poste ankaŭ inter **Moro** kaj la **Blanka Reĝo**, konfrontiĝas la soldataroj de la du reĝoj.

Post la fino de la dialogoj, la bataldanĉon anticipas "**Sfida**" (provoko). Ĝi estas la danco de **Moro**, al kiu poste aliĝas ankaŭ la du reĝoj. Post la provoko, komenciĝas la bataldanco kun vigla glavsvingado.

Tiu parto de moresko konsistas el sep diversaj figuroj (nomiĝantaj **KOLAP** = bato, kvankam preskau ĉiu figuro havas ankaŭ specifan nomon).

Sinsekve la batoj nomiĝas:

Figuro RUGIER - titolita laŭ la normana vojevodo Rugier la Unua, kiu batalis kontraŭ araboj en Sicilio, kaj mortis en la jaro 1101.

Figuro MOREŠKA

Figuro FINTA kiu konsistas el du subfiguroj, el kiuj la unua nomiĝas **MORO IN DENTRO**, kaj la dua **PARA PIE**.

Post la fino de ĉi tiu figuro intervenas fraŭlino Bula, kiu klopodas pacigi la batalantojn, sed ili rifuzas, kaj la batalo plu daŭras.

Figuro KRUCO

Figuro RUGIER DE FUORIVIA

Figuro SEPA BATO, finiĝas per malvenko de la blanka soldataro, kapitulaco de **Moro**, kaj la **Blanka Reĝo** liberigas la fraŭlinon. Ĉi tiun figuron enkondukis komence de la 20-a jarcento **Ivo Tedesci** kiel evoluon de la subfiguro **MORO IN DENTRO (IV)**. Ĉi tiu figuro apartenas al nemultaj ŝanĝoj en moresko de pratempoj.

Moresko estas ludata kun muzika akompano, kaj dum ĝia historio estis komponitaj kelkaj diversaj muzikaĵoj. La nuntempa moresko en **Korĉula** uzas la muzikon kiun en 1937 por blovorkestro komponis kroata komponisto **Krsto Odak** (1888-1965). Tiu komponaĵo estas uzata senĉese ekde la jaro 1947.

Multaj turistoj vizitantaj la insulon **Korĉula**, kun aparta intereso spektas la spektaklon.



LA TRIĜIBA MONTO

(Originala titolo: *A hárompúpú hegy*)

Ferenc Szemlér
(1906-1978)

3

Ili eksidis en la ombreon de arbo, nemalproksime de la stacidomo.

– Restu ĉi-tie, kaj vi atentu, ke la infanoj ne disiradu! Mi iros serĉi la oficejon. Serĉi loĝejon ni povos ankaŭ poste. – diris Balázs al la edzino, kaj ekiris al la stratoj svene kuŝantaj pro varmego.

Li pasis ĉi-tie kelkfoje dum la soldatservo, kaj nun li orientiĝis kun certeco de somnambulo. Li ne sentis fremdecon, kaj foj-foje ekaŭditaj italaj vortoj eĉ vekis en li senton de hejmeco. Tamen li ne sentis sin tute hejme. Kvazaŭ li estus ekirinta sur malbona vojo, kaj li devus returniĝi – tio maltrankviligis lin nevortigeble.

Jam oni volis fermi la oficejon, kiam li alvenis. Mirinde oni jam estis informitaj pri li, kvankam lia amiko ne ĉeestis. Atendu nur, ĉar li baldaŭ alvenos. Apenaŭ li eksidis en la dezerte blanka ĉambro, sur kies muro pendis portreto de la apostola reĝo Francisko Jozefo, kiam vere eniris lia iama ĉefo.

Dum nur mallongaj dek minutoj evidentiĝis, ke ĉio estas en ordo kaj nenio estas en ordo. Oni jam tre senpacience atendis Balázs-on, ĉar la laboro estas terure urĝa! Oni bezonas homon, kiu jam havas sperton en tia laboro, sed tio, kion oni konstruas, estas ne en Fiume, sed iom pli malproksime, en marborda vilaĝeto, kies nomo estas Mošćenice, en plena formo: Mošćenice Draga.

– Ankaŭ mi ne sciis tute certe, kion ni konstruas tie – diris lia amiko ŝanĝante, konfidence frustrante, la parolon en la hungaran,

ĉar ĝis tiam ili parolis itale. – Mi kredas, ke havenon por submarŝipoj. Sed kiamaniere ŝipoj enŝoviĝos tien, mi eĉ ne povas imagi, ja tiel malprofunde estas ĉeborde ...

– Ankaŭ la familion mi venigis – konfesis Balázs post iom da hontema hezito.

La liphara laborinspektoro kun malmola kolumo jetis strangan rigardon al li. Sed poste li tiris la ŝultron.

– Do, tio ne gravas. Almenaŭ vi havos iun, kiu kuiras por vi. Kaj la buboj povos bani sin en la maro. Nur en tiu kazo vi devos aĉeti ŝipbiletojn ankaŭ por ili. Kompreneble, vi ne havas monon.

La viro konfesis kun faciliĝo, ke li ne havas.

– Nu, ne gravas! Estas ĉi-tie sufiĉe da mono. La laboro estas por la Trezorejo, kaj tiu fia italaĉa entreprenisto jam enpoŝigis tiom da antaŭmono, ke ĝi sufiĉus por departemento. Sed almenaŭ ankaŭ ni ricevos.

Kiam post du horoj li revenis al la familio preskaŭ

La temo de la romano "La triĝiba monto" estas la unua mondmilito. La 100-an datrevenon de ĝia komenco ni signos en la jaro 2014. La eventoj de la romano okazas ĉefe en Mošćenička Draga en Kroatio. La trian ĉapitron de la romano ni publikigas kun afabla permeso de sinjorino Judit Mocanu Szemlér el Bukureŝto (Rumanio), unu el la filinoj de la aŭtoro.

svenanta pro la varmego, lian poŝon ŝveligis kvin biletoj por pasaĝera vaporŝipo kaj graspalpaj dekkronaj monbiletoj. Lian bruston ŝveligis litro da ruĝa itala vino, kiun li trinkis nemanĝinte en restoracieto kun la amiko, ĝojante pro la sukcesa afero. Dume el la ricevita antaŭmono li fordonis ankaŭ iom da kurtaĝo, verdire kun dolora koro. Sed la amiko klarigis, ke la afero ne funkcias alimaniere. Gravas, ke li



Mošćenička Draga senpere antaŭ la Unua mondmilito (1913)

estas tie, kaj ankaŭ la familio fartos bone.

Li aŭskultis tra malpeza nebulo la plendojn de la edzino pro la timiga varmego. Li tute ne komprenis, kial ŝi malesperas pro tio, ke Pisti kuŝas preskaŭ svena sur la pakaĉoj metitaj en la malvastiĝantan ombbron de arbo: lia bruneca vizaĝo estis timige pala. Sed la patro rekuraĝiĝis. Li helpis al la filo ekstari, ekgvidis la aliajn, kaj pene portante la pakaĵojn, li ekiris ŝvitkovrita al la haveno.

La malforta, sed daŭre blovanta venteto el la direkto de la maro, baldaŭ refreŝigis la tutan familion.

– Nun mi fartas tute bone – diris Pisti, kaj lia bruna vizaĝo videble ruĝiĝis.

– Ĉu ne mi diris? – ekĝojis la patro, el kies kapo rapide forvaporigis la malforta itala vino. – Antaŭen, antaŭen, ne ŝanceliĝadu – li admonis la pliaĝan filon. – Tie ĉe la angulo estas restoracio kun fiŝo sur la ŝildo, nur ĝis tie ni devos iri...

En la ejo kun olefarbitaj muroj estis surprize malmultaj homoj, kaj la pasaĝerojn atendis surpriza malvarmeto. La infanoj aŭskultis kun miro la patron, kiu interparolis flue kun la itala kelnero. Ankaŭ la virino sentis respekton en tiu momento por la edzo, kvankam la restoracion, similan al drinkejo, ŝi ne trovis eleganta.

Ili manĝis kiel malsataj lupoj la nekutimajn manĝaĵojn. Precipe la fiŝo havis grandan sukceson. Ili eĉ ne rimarkis, ke ĝi estis fritita en oleo. Fine Böske trinkis ankaŭ duono de la ruĝa vino el la glaso, kaj ŝi devis konfesi, ke ĝi estis laŭplaĉa.

Tra la restoracieta pordo, farita el perla kurteno, oni povis vidi longan straton. La finon de la strato fermis kaosa malordo de mastoj kaj fumtuboj, ŝnuregoj kaj kabloj kun nekonata destino.

La patrino, laca kaj ankaŭ nekutimiĝinta al vino, svenetis, pro

kio ŝi preferis gardi la pakaĵojn. La tri knaboj gvidataj de la patro ekiris laŭ la longa strato antaŭen.

La strato ŝajnis longa, ĉar ĝi estis senhoma kaj forlasita, sed fakte ĝi estis mallonga, kaj ili ne devis iradi longan tempon en la sufoka, blanka varmego, kaj jam antaŭ ili estis la kajo. Trans ĝiaj kvadrataj blokoj konstruitaj el larĝaj kubŝtonoj, antaŭ la ekvido de la maro, altiĝis mastoj kaj veloj, kaj inter ili rapide preterflugis grandegaj blankaj birdoj. Kelkfoje ili falflugis profunden, poste denove leviĝis supren, eligante strangajn krikojn.

– Mevoj! – diris la patro. – Ili ŝatas la fiŝojn, sed manĝas ankaŭ ĉiaspecajn malpuraĵojn, kiujn ili trovas en la maro.

– Netre bela estas tiu maro. – diris Béla kun sincera senreviĝo, kiam de iom malproksime, el la rando de la moleo, li rigardis al la lante ondiĝanta akvo.

Kaj vere, la maro ĉi-tie ne montriĝis en favora aspekto. Kie estas la matena fabela lazuro, respegulanta miraklon, kiu mutigas la mortemulojn ĝin ekvidintajn?... La akvo ĉi-tie estis verdeca kaj ŝaŭma. Sur la surfaco de la pigraj ondoj sin frapantaj al la bordo naĝadis pankrusto, korkoj kaj senvivaj maraj araneoj. Kiam la ŝaŭmo klariĝis, en la profundo ili vidis muskovovritajn ŝtonegojn, malplenajn konservujojn kaj ferajn rubaĵojn.

– Mi tamen amas ĝin. – diris Pisti. – Tiel bona freŝeco venas el ĝi, kaj ĝi havas ankaŭ bonan odoron.

– Ĝia odoro estas tia, kia de Küküllő. – diris iom lispinte la rondkapa Géza. Kutime la plej malgranda malofte miksiĝis en la parolon de la pliaĝaj fratoj, sed nun li sentis nerezisteblan deziron diri sian opinion.

– Tute ĝi ne estas tia! – haltigis lin Béla. – Ĉi-tie ĉio estas salodora, kaj hejme ĉio estas plena

de ŝimodoro...

Ili havis ankoraŭ preskaŭ unu horon ĝis la ekiro de la vaporŝipo. Do, ili promenadis ĝis la fino de la moleo, kie kure venis kontraŭ ili la ondoj kun malgrandaj ŝaŭmvezikoj, kaj la vento susuranta flurtigis iliajn vestaĵojn. La infanoj iom kapturmiĝe alkraciĝis al la patro. La ĉarpentisto ridetante admonis ilin, ke tio estas nenio kompare kun la ŝtormo, kaj krome ili nun estas ankoraŭ sur tero. Sed la infanoj tamen alkraciĝis, kaj ne tre ĝuis la vidaĵon antaŭ si. Sed el la rando de la moleo oni povis vidi la longan golfon, kaj en la posttagmeza suno estis videbla tiu stranga monto, kiu jam en la trajno kaptis la atenton de la alvenintoj.

Haste ili returniĝis al la restoracio, kie la patrino ĉagrene sidis en granda soleco, kaj hungare rifuzis la ofertojn de la kelnero, kiu volis proponi nur glason da glacia akvo al la fremda virino, kiu sidadis rigide en sia nigra robo.

Kune kun la pasaĝeroj de la tria klaso, ankaŭ ili plenŝtopiĝis ie en la mezo de la borda vaporŝipeto. Sed ĉar ĉi-tie oni ne aplikis tiel strikte la dividon, kiel en grandaj marŝipoj, povis okazi, ke Balázs-edzino kaj la tri infanoj jam antaŭ la ekiro de la ŝipo okupis lokojn en la malantaŭa, sinjora parto de la ferdeko, barita per drata barilo. La edzo penadis kun la pakaĵoj, kaj restis en sia loko.

– Atentu, ne falu en la akvon! – admonis la patrino la tri infanojn, kiuj genuante sur la ĉirkaŭaj benkoj de la ferdeko, rigardis tra barilo la akvon ŝaŭmantan ĉe la malantaŭo de la ŝipo.

Ŝi tute ne sentis sin altrude enirinta. Ankaŭ ŝiaj infanoj ne estis pli malbone vestitaj ol la aliaj en la ŝipo, kaj ŝi mem, vestita en iom eksmodiĝintaj vestaĵoj, pli aspektis kiel iu superece malestimanta la modon, ol iu nun strebanta aparteni al la burĝaro.

Nur al la edzo ne plaĉis tiu konduto. Al István Balázs ŝajnis, ke lia edzino faras ion malpermesitan, kio povus kaŭzi malagrablaĵon. Sidante apud la pakaĵoj, subite li eksentis denove ĉagrenon. Li koleriĝis kontraŭ la tuta mondo reprezentita nun per ĉi-tiu ŝipo kun siaj kupraj bariloj, polurita planko kaj bruantaj maŝinoj.

– Ni ekiras! Ni ekiras! – kriadis Béla, kaj turnis sian tonditan, blondan kapon al la patro. Li estis la unua kiu rimarkis, rigardante tra la barilo, ke sube io kirlas la akvon. Tiu io batis blankan ŝaŭmon ĉe la malantaŭa parto de la ŝipo, kaj la zumado de la maŝinoj plilaŭtiĝis. Poste la bordo de la haveno komencis malrapide malproksimiĝi. La infanoj buŝmalferme gapis la strangan fenomenon.

La bordo fortorniĝis, kaj la aliaj ŝipoj ankritaj laŭlonge de la haveno bele malproksimiĝis unu post la alia. La domoj kaj aliaj konstruaĵoj, videblaj tra la breĉoj inter la ŝipoj, pli kaj pli malgrandiĝis, kaj la konstante ronronanta vaporŝipo nun jam turniĝis al la akvo de la malfermiĝinta golfo. Subite pli granda ol ĉiuj ĝis nunaj, blugrize farbata vapore altiris la atenton de la infanoj.

– Kiuspeca estas tiu vapore, panjo?... - demandis Pisti.

La patrino ne respondis, ĉar ŝi eĉ konjekton ne havis pri tio. Ĉiuj kvar longe admiris la strangan giganton ripozantan sur du ankroj, en kies ĉiuj flankoj kanonoj en laŭregula ordo direktiĝis en la aeron. Ĉirkaŭ la kanonoj maristoj iradis tien kaj reen, ŝajne sencele, sed subite du apudaj kanontuboj malrapide ekmoviĝis, kaj siajn nigrajn faŭkojn turnis al la vasta maro.

Pisti sur la frapetanta ferdeko kuris tien, kie la patro staradis apud la pakaĵoj.

– Paĉjo, kiuspeca granda ŝipo estas tiu griza?...

La patro malrapide

turniĝis, kaj la trankvilajn, nuksokolorajn okulojn direktis laŭlonge de la ondiga grizblua akvo ĝis tiu loko, kie la grizblua ŝipo luliĝis. Li observadis ĝin kun iom kuntiritaj brovoj.

– Ĝi estas la "Szent István". La batalŝipo – li aldonis decide. – Ankaŭ mi estis sur ĝi. En la kajuto de la ŝipestro mi surmetis la mahagonan tegaĵon anstataŭ la meblisto kiu malsaniĝis.

– Kial ĉi-tiu batalŝipo staras ĉi-tie?

La viro por momento serioziĝis.

– Tion ankaŭ mi ŝatus scii, fileto. Sed povas esti, ke temas nur pri ekzercado. Ĝi kutimas fari tion.

Pisti trotis reen al la du aliaj fratoj, kaj per superema saĝeco informis ilin pri la scioj nove akiritaj. La patro apud la pakaĵoj longe rigardis post la filo, kaj lia vizaĝo malheliĝis.

La vaporŝipo nun jam estis sufiĉe malproksime de la bordo, kaj per rapida glito hastis al sia celo. La moviĝo rezultis ŝirigantan ŝaŭmon ĉirkaŭ la pruo, kaj supre, sur la ferdeko, la facila, posttagmeza venteto disportis malvarmetan salan odoron, kiu preterusuris Kvarneron.

István Balázs nun ekstaris, kaj decidpaŝe ekiris al la unuaklasa parto de la ferdeko. Li ne trapasis la dividlinion, sed nur kapsignis al la edzino signifoplene. La virino ne montris dum iom da tempo, ĉu ŝi rimarkis ĝin aŭ ne. Poste ŝi ĝemetis kaj ekstaris por iri al la edzo. Ŝi bedaŭris, ke estis fuŝita ĝia ĝojo.

La edzo iris antaŭen ĝis la pakaĵoj, kaj tie li eksidis. La edzino staradis iomete, poste ankaŭ ŝi eksidis apud lin.

– Mi diras Böske, ke vi alvenu kun la infanoj ĉi-tien, al via loko. – diris li post iom da tempo trankvile.

La edzino ne respondis. Siajn brunajn okulojn ŝi obstine fiksas al la arbarkovrita bordlinio,

kiu trans la akvo ŝajnis kaj proksima, kaj malproksima.

– Malutilas al neniu, se ni estas tie. – diris ŝi kvazaŭ por si mem.

– Al vi tio malutilas, se vi estas tie! – rebatis preskaŭ tuj la viro. – Denove vi ludas sinjorinon. Anstataŭ nun kamplabori hejme, vi sidas ĉapelita sur ŝipo, kaj iras ferii. – aldonis li kun morna ironio.

– Ankaŭ vi scias, ke ne ferii ni iras, sed Pisti-n ni venigas por resaniĝi. – diris la virino ruĝvizaĝe.

– Sed por tio ne necesas altrudiĝi en la unuan klason! Ne forgesu, kiu vi estas kaj kiuj ni estas.

– Ĉu tiuj estas pli bonaj ol ni? – kapsignis spite la virino al la malantaŭa parto de la ŝipo.

– Ne pli bonaj, sed aliaj. Komprenu do, ke vi havas nenian rilaton kun ili. Kaj restu ĉi-tie!...

La virino obstine kunpremis la maldikajn lipojn, kaj ne respondis. Ŝiaj okuloj denove fiksiĝis al la montara, arbara bordoparto, kiu malrapide proksimiĝis al la ŝipo. La domoj sur la bordo grandiĝis, jam ankaŭ la haveno ekprenis formon, kaj la vaporŝipo milde atingis la ŝtonan muron. Ĝis kiam la pasaĝeroj elŝipiĝis kaj enŝipiĝis, ili ne parolis. Sed kiam la maŝinoj ekbruis, denove ili rekomencis.

Vane brilis ĉirkaŭ ili, super ili kaj apud ili la suno, vane sekvis unu post la alia la allogaj havenoj de Abbazia¹, Lovrana², vane la ĝentila maro ludis por ili siajn plej plaĉajn ludojn, ili disputadis malkviete sidante sur la grandegaj pakaĵoj, kiel koleretaj antropoidaj simioj fermitaj en kaĝo de la ŝipo, transportataj de nekonataj vendistoj al zoologia ĝardeno de nekonata urbo.

Ili forgesis komplete siajn infanojn.

La komencaj sukcesoj de Pisti kun "Szent István" rapide bagateliĝis. La gvidadon transprenis

la blonda Béla, kaj la tri knaboj, ĉiuj vestitaj en ruĝstriaĵ sportaj ĉemizoj, sen antaŭjuĝoj promenadis tien-reen, de unu bariero ĝis la alia, kaj admiris la ombrajn deklivojn de la proksima bordo, la malkontinuan linion de la transflanko de la golfo volvitane en bluecaj vaporettoj.

La pasaĝeroj ne multe zorgis pri ili, eĉ ilia hungara parolo ne multe interesis ilin. Nur mezalta, dek-dekdujara, belete vestita, blonda knabo, kaj knabino same belete vestita, kun longaj, blondaj harplektaĵoj, ĵetis kelkfoje al ili esploremaĵojn rigardojn.

Subite de maldekstre ekaperis, ŝajne de tute proksime, tiu stranga monto vidita antaŭ Fiume.

– Rigardu, Béla, ankaŭ tiu monto havas tri ĝibojn! – ekkriis Pisti rigardante tra la barilo de la ŝipo la novan apearĵon. – Kaj kiel ĝi nomiĝas?...

– Tiu insulo estas Cherso³ – ekparolis apud li la belete vestita, blonda knabo. – Kaj vere ĝi havas

tri ĝibojn.

Dum momento la knaboj malaplobe rigardis al la nekonato. Poste Béla kuraĝe demandis lin:

– Kien vi vojaĝas?

– Al Moŝčenice. – respondis la nekonata knabo – Baldaŭ ni alvenos. Kaj vi, kien vi iras?

– Ankaŭ ni al Moŝčenice – venis la respondo.

– Ĉu vi aŭdas, Kuki?... Ankaŭ ili iras al Moŝčenice! – diris la nekonata knabo.

– Eĥ, Miki, ne alparolu iun ajn! – diris la knabino kun longaj harplektaĵoj, ĉi-foje itale, por ke la tri knaboj ne komprenu.

Kaj vere ili ne komprenis, sed la paroltono povintus malkaŝi multon. Sed tiumomente la serioza figuro de la patro ekaperis ĉe la perono, kaj kapsigne venigis ilin al si. Forirante, Pisti retrorigardis, kaj ŝajnis al li, ke la nekonata knabo ridetas.

La ŝipo nun alproksimiĝis


al la ŝtona muro de la haveno, kaj la akvo kirlita de la helicoj mallaŭtiĝis. Tra la mallarĝa ponto kiel la unuaj hastis la nekonataj knabo kaj knabino, kiuj nomis unu la alian Kuki kaj Miki. Post ili venis la unuaklasaj pasaĝeroj kaj nur tre malfrue la Balázsoj, pene portantaj pakajojn, pakaĉojn, paperajn sakojn.

Ĝis kiam ankaŭ ili atingis la bordon, la moleo jam estis preskaŭ senhoma, nur unu-du ŝarĝistoj staradis ankoraŭ, atendante la bonŝancon. La suno tiumomente atingis la supron de la arbarkovrita montara ĉeno altiĝanta super la haveno, kaj la ardan varmegon de la tagmezo anstataŭis milda ombro. Sed trans la malproksima monto, kontraŭ la haveno, brilis en plena lumo la insulo Cherso.

- 1) *Abbazia* - nuntempe: Opatija
- 2) *Lovrana* - nuntempe: Lovran
- 3) *Cherso* - nuntempe: Cres

Tradukis: Lenke Szász

Biografie pri la verkisto Ferenc Szemlér



Ferenc Szemlér naskiĝis la 3-an de aprilo 1906 en la urbeto Székelyudvarhely (rumane: Odorheiu Secuiesc). Kiel la nomo de la urbo montras, ĝi estas loĝata plejparte de sikulaj hungaroj. El tiu transilvania urbeto ekiras la rolantoj de la porjunulara romaneto "*La triĝiba monto*", István Balázs kun la familio, al la Moŝčenice Draga por labori ĉe tiea konstruado, kaj por ke malsanema fileto plifortiĝu ĉe la marbordo.

Ferenc Szemlér, la verkisto, lernis juron en la universitato en Bukureŝto. Liaj unuaj poemoj kaj prozaĵoj aperis en 1923. Ekde 1930 ĝis 1948 li estis loĝata kaj ĵurnalisto en Braŝovo (rumane: Braşov). En 1938 li fondis la eldonejon *Erdélyi Enciklopedia*. Inter 1944 kaj 1946 li redaktis gazeton. Ekde 1953 li estis redaktisto de la literatura revuo *Igaz Szó*. Ekde 1956 li loĝis en Bukureŝto. Li havis gvidan rolon en la rumania hungara literaturo. Dum iom da tempo li estis sekretario de la *Rumania Verkista Asocio*.

La sorton de minoritato li sentis sia natura medio, kaj en siaj verkoj li esprimis tiun senton. Lian poetan lingvon influis la ekspresionismo kaj la libera poemo de *Whitman*. Ekde la 1960-aj jaroj li revokis la rememorojn de sia junaĝo, pentris la belajojn de la naturo, rakontis pri kulturaj travivaĵoj kaj elegie esprimis la doloron de la maljuniĝo.

Li verkis poemojn, pli ol dek romanojn, dramojn, eseojn, memuarojn kaj multe tradukis el la rumana literaturo. En 1942 li ricevis la premion *Baumgarten*, kaj en 1953 la *Ŝtatan Premion de la Rumana Popola Respubliko*.

Li forpasis la 9-an de januaro 1978.

La romaneto "*La triĝiba monto*" aperis en 1957, 1977 kaj 1978.

NOVA DIREKTORO EN VIENO

La direktoro de la *Literatura Arkivo* de la *Aŭstria Nacia Biblioteko*, privata docento doktoro *Bernhard Fetz*, transprenis je la 1-a de aŭgusto 2013 ankaŭ la direktorecon de la *Kolekto por Planlingvoj* kaj de la *Esperantomuzeo* de la *Aŭstria Nacia Biblioteko*. En tiu funkcio li sekvas kortegan konsiliston magistron *Herbert Mayer*, kiu fine de julio 2013 emeritiĝis. Inter la plej gravaj evoluoj dum la oficperiodo de direktoro *Mayer*, ekde 1988, estas la translokiĝo de la kolekto kaj de la muzeo en la *Palais Mollard*, la novkonceptado de la *Esperantomuzeo* kaj la komenco de la ampleksaj ciferecigoj de la

biblioteka kaj muzea havaĵoj.

La komuna gvidado de la *Literatura Arkivo* kaj de la *Kolekto por Planlingvoj*, kiu restos ankaŭ estontece memstara je la kutima loko en la *Palais Mollard*, ebligas valorajn kaj riĉigajn sinergiojn en enhava kaj arkiva rilatoj: Ambaŭ kolektoj dokumentas la 20-an jarcenton, precipe la intermilitan periodon, kaj diversajn aspektojn de lingvofilozofio. Ankaŭ rilate la praktikan arkivlaboron rezultigas multnombraj punktoj de kontakto pro la similaj objektipoj en modernaj postlasaĵoj.

Krome magistro *Bernhard Tuider*, fakulo sur la kampo de esperantologio kaj

longjara kunlaboranto, estis nomumita teamestro. Li gvidas la laborojn en la interlingvistika fakbiblioteko kaj deĵoras kiel unua kompetenta fakulo por interesatoj kaj fakkolegoj.

La *Kolekto por Planlingvoj* kaj precipe la *Esperantomuzeo* estos ankaŭ estontece vivanta loko de renkontoj por ĉiuj, kiuj interesiĝas por niaj havaĵoj, muzeaj gvidadoj kaj kursoj. Por demandoj:

Mag. Bernhard Tuider
bernhard.tuider@onb.ac.at
 +43 1 53410-731
Palais Mollard
Herrengasse 9
 1010 Wien, Aŭstrio

NOVA REDAKTORO ĈE UEA

 *Gazetara komunikado de UEA*

Unuafoje en pli ol cent jaroj, la revuo *Esperanto* havos sian redaktejon ekster Eŭropo. La brazilano *Fabrcio Valle* estas elektita de la Estraro de UEA por transpreni la redaktoran postenon de *Stano Marček*, ekde la jarkolekto 2014.

"Jam en sia skriba sinprezento, Fabrcio Valle montris grandan energion kaj kreemon, kaj krome tre realisman ideon pri la redaktora laboro", komentas la Prezidanto de UEA, d-ro *Mark Fettes*. "Tiun impreson plene konfirmis mia telefona intervjuo kun li. Ni estas entuziasmaj pri la ideoj kaj kapabloj, kiujn li alportos al nia komuna afero".

Valle estis unu el ses kandidatoj por la posteno de redaktoro (unu pli ol anoncite en pli frua komunikado). Movadano ekde



1970, li okupis diversajn postenojn en la brazila movado, interalie kiel prezidanto aŭ estrarano de Brazila Esperantista Junulara Organizo (1977-81), oficisto de Brazila Esperanto-Ligo (1996-2001) kaj prezidanto de la Federacia Konsilantaro de BEL (2001-04). Li ankaŭ fondis kaj gvidis propran eldon-

entreprenon, *Zamenhof Editores*, de 1987 ĝis 1995. Lastatempe li okupiĝis pri provo kreskigi la esperantistan ekonomion kadre de la organizo *Intraespo*.

La redaktoraĵoj de *Valle* estas videblaj en la ok numeroj de *Brazila Esperantisto*, kiujn li redaktis en la jaroj 2001-02. Enkondukante novan aspekton kaj novan teamon de kunlaborantoj, li kreis revuon kiu elstaris grafike, stile kaj enhave.

Ankaŭ por la revuo *Esperanto Valle* antaŭvidas proksiman kunlaboron kun talentuloj sur diversaj kampoj, cele al revuo kiu laŭ li "transformiĝos en aktivan engaĝilon, en instrugazeton por trejnado de volontuloj, en heroldon de la plej bonaj iniciatoj de la movadaĵo organizoj tra la mondo, en gvidilon por veteranaj kaj komencantaj E-gvidantoj, en inspiron por la esperantoj."

NOVA PREZIDANTO DE LA AKADEMIO

Profesoro **Christer Kiselman** el la Matematika instituto de la Upsala Universitato (Svedio) estas elektita kiel la nova prezidanto de la *Akademio de Esperanto* (AdE) rezulte de la voĉdonado de 37 akademianoj.

Christer Kiselman estas membro de AdE ekde 1989. Lasta-tempe li oficis en AdE kiel direktoro de la sekcio pri faka lingvo kaj membro en la sekcioj pri gramatiko, pri la ĝenerala vortaro kaj pri prononco. En Esperantujo li estas konata ankaŭ pro la organizado de la esperantologiaj



konferencoj en la Universalaj Kongresoj, pro redaktado de la

revuo *Esperantologio / Esperanto Studies* kaj pro la multaj prelegoj kaj artikoloj pri esperantologiaj temoj.

La nova estraro de AdE konsistas el: **Christer Kiselman** (prezidanto), **Probal Dasgupta** (vicprezidanto), **Brian Moon** (vicprezidanto) kaj **Renato Corsetti** (sekretario).

Kiel direktoroj estis elektitaj: **Sergio Pokrovskij** (Faka Lingvo), **Bertilo Wennergren** (Gramatiko), **Markos Kramer** (Ĝenerala Vortaro), **Anna Lowenstein** (Kontrolado de lerniloj), **Alexander Shlafer** (Lingva Konsultejo), **Paul Gubbins** (Literaturo), **Probal Dasgupta** (Prononco), **Carlo Minnaja** (Komisiono Historio de AdE), **Nguyen Xuan Thu** (Komisiono pri homaj nomoj).

NOVA ESTRARO DE TEJO

La komitato de TEJO dum la ĉi-jara IJK okazinta en Nazareto (Israelo) elektis sian novan, sepmembran estraron. Siajn postenojn retenis la antaŭaj prezidanto **Lukas Żebrowski**, (Pollando), ĝenerala sekretario

Pawel Fischer-Kotowski (Pollando) kaj kasisto **Nico Huurman** (Nederlando). En la estraro restis ankaŭ **Boris Mandirola** (Italio) kaj **Tina Tišljar** (Kroatio).

Novaj estraranoj fariĝis **Veronika Poór** (Hungario) kaj

Alexandre Raymond (Francio/ Brazilo). La estraron forlasis **Sergeo Tyrin** (Israelo) kiu ne rekandidatiĝis, kaj **Petra Smidéliusz** (Hungario/ Argentino) kiu ne estis reelektita de la komitato. Bonŝancon al la novelektita estraro!

EPIGRAMOJ DE DINKO

Dinko Matković

PESILO

Sur ĝi ni pesas
ne nur pezantajn aĵojn
sed ni ofte pesas
ankaŭ fortajn vortojn.

TAMBURO

En muziko ĝi akorde tamburas
sola ĝi estas per bastonoj malproksime aŭdigata
sed vi estas sklavo
kiam via havaĵo estas per ĝi aŭkciata.

TORĈO

Kiam torĉo ekbrulas olimpian flamon
sportaj ludoj estas malfermitaj
sed kiam torĉoj flugas sur piedpilka ludejo
sporta ludo estas fermita.

VIDBLECO

Multaj estas miopaj
kaj vidas pli kaj pli malbone
kaj ili el centroj
ne vidas tiujn el periferioj.

KRISTNASKA STELO: ĈU MISTERO SOLVITA?

 Nicola Morandi

Post iom da tempo mi denove volas pritrakti la saman temon – t. e. kristnaskan stelon – pri kiu mi jam okupiĝis en la artikolo "La kristnaska stelo" ("Zagreba Esperantisto" n-ro 6(19)/2011, paĝo 178).

Mi faras tion, post kiam mi trovis novajn interesajn elementojn, kiuj ĵetas novan lumon sur ĉi tiun misteron, ĉefe dank' al novaj enketadmetodo kaj interpretado pri tio, kion oni jam konas.

Mi trovis ĉi-tiujn novajn elementojn en tre interesa libro de d-ro **Alvaro Innocenti**, klerulo kaj spertulo pri la *Biblio*, titolita "Tempmilitoj en la ĉielo de Judaso" (eldonisto: MEF el Florenco [Italio] - Atheneum 2002; bedaŭrinde ĝi estas nur en la itala lingvo; <http://www.protocol.it/web/alvaro/index.htm>).

La verko estas prezentita de d-ro **Giancarlo Favero**, eksprezidanto de UAI Unuiĝo de Italaj Stelamantoj (UAI), kiu diras, ke **Innocenti**, dank' al sia enketadmetodo pri la sanktaj skribaĵoj, obtenas, ke "ĉiuj misteraj partoj de la plej hermetikaj evengeliaj rakontoj estu lumigitaj de nova lumo...".

La enketado de **Alvaro Innocenti** estas pure scienca, sed li ankaŭ konsideras la manieron, laŭ kiu estis pritraktataj ĉi tiuj temoj en la kultura medio dum la epoko, en kiu la eventoj okazis.

Ja la evangelioj, kiel **Innocenti** diras, "ofte diras alion, sed ne tion, kion ili ŝajnas ekspliki". Tio estas koncepto, kiu jam impresis min antaŭ iom da jaroj, kiam mi preskaŭ same trovis ĝin en bela libro de **Isaac Asimov**, titolita "Elektro da katastrofoj".

Asimov, parolante pri la vortoj "katastrofo" kaj "apokalipso", kiuj estas konceptoj ĉeestantaj en la kulturoj de multaj antikvaj popoloj, diras, ke inter la Hebreoj, dum la sklavecperiodo sub Babilono "naskiĝis plendo... pri la reveno de la regno kaj pri reĝo de la antikva davida generacio. Ĉar ĉi tiuj deziroj, se ili estus publike esprimataj, aperintus kiel trompo al la okuloj de la nehebreaj estroj, komenciĝis kutimo paroli kriptmaniere pri la reveno de la reĝo..."

Antaŭdirinte tion, ni nun parolos pri la teksto, kiu interesas al ni, t. e. la evangelio de Mateo, la nura teksto, kiu parolas pri la betlehema stelo kaj la Magoj, kiuj ĝin sekvis.

Alvaro Innocenti en sia libro uzas preskaŭ dudek paĝojn por konduki la leganton laŭ tre fascina kaj pasie interesa itinero kiu, ĉe sia fino, vidigas realon, kiu antaŭe estis senespere kaŝita.

Tamen ni devas klarigi, ke la verko ne pritraktas nur la kristnaskan stelon. Fakte, la aŭtoro per ĉi tiu libro klopodas doni novan interpretadon al ĉiuj kriptaĵoj de la Nova Testamento.

La sciencistoj dum multaj jarcentoj tre cerbumis por doni realan bazon al tiuj mallongaj frazoj (Mt 2,1, Mt 2,9), kiujn ĉi tie ni transskribas: "Avenis el Oriento al Jerusalemo Magoj. Kaj ili demandis: 'Kie troviĝas tiu Infano, ĵus naskiĝinta, la reĝo de la Judo?' En Oriento ni vidis lian stelon, kiu aperis sur la ĉielo, kaj ni venis adorkliniĝi al Li'"; "Tiam la stelo, kiun ili vidis en Oriento, reaparis kaj gvidis ilin ĝis ĝi haltis super loko, kie estis la Infano".

Por klarigi ĉi tiun tutan aferon, laŭ tio, kion mi jam diris en mia antaŭa artikolo, oni parolis pri multaj ĉielaj fenomenoj, kiuj okazis dum tiu periodo, ekzemple konjunkcioj kaj kaŝiĝoj.

Sekvante la enketadon de **Innocenti**, ni devas konsideri, ke dum tiuj tempoj, ĉiuj kleruloj pri la ĉiela volbo (persoj, grekoj, egiptoj aŭ hebreoj) estis perfekte kapablaj rekonii konjunkcion de du planedoj aŭ kaŝiĝon de planedo malantaŭ la Luno, aŭ eĉ kometon, kaj certe ili ne parolus pri stelo aŭ, por pli bone diri, pri "la stelo", aŭ "lia stelo", se ĝi ne estus vere tio.

La *Matea evangelio*, la plej hebrea inter la kvar kanonaj, diras ankaŭ: "De Egiptujo mi alvokis mian filon" kaj iom poste diras: "Reĝo Herodo sekrete alvokis la Magojn kaj precize informiĝis pri la tempo, kiam aperis la stelo".

Ĉi tiuj verseĝoj, ni konstatos, estus decidaj por la solvo de la enigmo.

Kial, **Innocenti** demandas al si, **Herodo** petis ĉi tiun informon ĝuste al la Magoj? La stelo certe estis videbla al ĉiuj kaj Herodo certe havis ĉe si multajn saĝulojn, kiuj kapablis informi lin pri ĉio, kion dum tiu periodo oni sciis pri la steloj.

Por kompreni la signifon de la frazo "de Egiptujo mi alvokis mian filon" ni devas konsideri, ke ĝuste de Egiptujo, la lando en kiu ili mem estis en sklaveco, la hebreoj portis en la promesitan landon multajn konojn.

Ja la *Biblio* diras ke "Moseo estis instruita per la tuta saĝeco de la egiptoj". Nu, en Egiptujo estis kutimo atendi la inundojn de Nilo, kiuj estis portantoj



de fekundeco kaj, sekve, de vivo, post la observado en la ĉielo de la leviĝo de Siriuso tuj antaŭ la leviĝo de la suno, evento, kiu okazis – kaj ankaŭ nuntempe okazas – la 25-an de julio, en nia aktuala kalendaro.

La koincido estas tute hazarda, sed por la egiptoj vidi Siriuson, la plej luman stelon en la ĉielo, kiu iomete antaŭvenis la sunon dum ĝia leviĝo, estis kompreneble signo de dia bonvolemo.

La hebreoj celebris tiun tagon, kiu estis la naŭa tago de la Ab-monato en ilia kalendaro, kiel la tagon de la renaskiĝo.

Dum tiu sama tago **Jesaia** metas la naskiĝon de la **Mesio** kaj, denove en la sama tago, poste okazis la bapto kaj sanktulado de **Jesuo**.

Certe la hebreoj konservis la konon pri ĉi tiu mirakla signo kaj ili integrigis ĝin inter siaj religiaj tagrevenoj.

En sia enketado **Innocenti** serĉas ankaŭ informojn pri la Magoj, kaj li trovas iom da ili en la skribaĵoj de Herodoto.

La Magoj (kies nomo devenas de la antikva persa vorto *maga* aŭ *magu*, kiu signifas "donaco" aŭ "partoprenanto en la donaco") estis unu el ses triboj de Medioj. Ili havis sacerdotaĵajn karakterizojn kaj la funkcion kroni reĝojn.

De zoroastrismo de la epoko de la Magoj, verŝajne ankaŭ la mitraa kulto prenis ion, fakte ankaŭ **Mitrao** naskiĝas leviĝante de roko aŭ el groto.

La Magoj, dum la antikvaj tempoj, estis ankaŭ identigitaj kun la tri steloj de la zono de Oriono, kiuj fakte, en la folkloro de multaj popoloj, nomiĝis "la tri saĝuloj" aŭ "la tri reĝoj", aŭ ja "la tri Magoj".

Ĉi tiuj steloj trairas la ĉielon de oriento al okcidento, observante Siriuson, kiu, dum ĝi

estas leviĝanta, anoncas la naskiĝon de la suno kaj la alvenon de la vivo sur la teron, realigita de fekundeco de la kampoj, kiuj devas doni la manĝaĵojn.

Pro ĉi tiu motivo, en la *Matea evangelio*, **Herodo** turnas sin ĝuste al tiuj tri saĝuloj por havi informojn pri la stelo.

Tial, interpretante per realaj elementoj (aŭ, por pli ekzakte diri: astronomiaj konsideroj), la simblon rakonton de Mateo, la Magoj, t. e. la tri steloj de la zono de Oriono, vidas Siriuson, "la stelo"-n, la faman stelon (ni jam diris, ke ĝi

dum kiu renoviĝas la miraklo de la vivo.

Ja por la egiptoj kaj ankaŭ por kelkaj hebreaj triboj, la suno estis la infano!

Innocenti, citante "la ora branĉo"-n (1915) de d-ro **James G. Frazer**, antropologo, diras ke "la egiptoj ilustris la *junaskiĝintan sunon*" – aŭ por pli ĝuste diri, renaskiĝintan – "per la bildo de infano, kiun ili montris al adorantoj..." kaj "... la celebrantoj eliris ... de sanktejoj laŭdirante: 'La virgolino naskis!'".

Krome **Innocenti** invitas vidi alian ligaĵon kun Egiptujo. Se en Egiptujo la alegorio de la fino de la seka sezono, dekretita de transakvumo de Nilo, estas reprezentata de la fama mito de Oziriso, dismembrita kaj poste rekonstruita, en la kristanismo Jesuo, venkinto de la morto, estas ilustrita preskaŭ sammaniere.

Innocenti fine venas al konkludo dirante: "Ĉu estas eble, ke la itinero, kiun la triopo da saĝuloj trairas, por resti apud la stelo, estu 'tie' – en la plenstela ĉielo – sed ne 'ĉi tie' – surtere? Laŭ popolaj tradicioj malfacile kontraŭdireblaj, ŝajnas, ke jes".

Mateo, la nura evangeliisto citinta la kristnaskan stelon, kiu do estas Siriuso, ne rakontas pri vere okazinta evento; ja, se la evento estintus plene reala, ankaŭ Marko, Luka kaj Johano certe parolintus pri tio. Mateo, per sia rakonto, kiu plene ĉerpas el antikvaj mitoj kaj tradicioj, revivigas utilan konon, kiu estis parto de kulturaj konoj de multaj hebreoj: la kapablon legi en la ĉielo la anoncon de tio, kio, en la ĉirkaŭaĵoj de Nilo, estis konsiderata vera miraklo.



estas la plej luma el ĉiuj) dum ĝia leviĝo, kaj tiel ili estas atestantoj, ankaŭ se nur en la ĉielo, de ĉi tiu evento.

Siriuso estas revidita dum la sunleviĝo, post ĝia dumonata kaŝiĝo. Ja, dum la konjunkcia periodo kun la suno, Siriuso estas nevidebla pro la tro forta lumo de nia stelo.

Poste "ĝi haltis super loko, kie estis la Infano" (super la orienta horizonto), dum la aŭroro de nova tago, por montri la momenton,

OMAĜA RENKONTIĜO KUN TIBOR SEKELJ



Ivan Kujundžić

La homoj, ĝenerale, ne ŝatas la tombejojn kiuj nin rememorigas pri nia efemereco. Sed de tempo al tempo vizito al iu tombejo povas esti por nia menso tre agrabla kaj utila.

Tiel okazis ankaŭ la 21-an de septembro 2013, kiam 36 esperantistoj el Subotica, Senta, Mali Idoŝ kaj Beograd kunvenis en Baja-tombejo en Subotica por omaĝi la 25-an datrevenon de forpaso de nia kara **Tibor Sekelj**: Esperantisto, Homaranisto kaj Samideano.

Ni ĉiuj kolektiĝis ĉirkaŭ malgranda, bela, blanka monumento en la loka aleo de merituloj. La posttagmeza, jam aŭtuna suno milde brilis, la venteto susuris, ĉie abundis diversaj koloroj, sur la fono de verda herbo kaj arbfoliaro, kovrita per blueco de firmamento. Por momento ekregis silento. Ĉiuj rigardis la simplan monumenton, freŝe ornamitan per floroj, kun la nomo de nia samideano, datoj de lia naskiĝo kaj forpaso, kun du vortoj kiuj trafe karakterizas lin, lian tutan vivon: mondvojaĝanto... verkisto... En tiu momento de solena silento, la nuneco kaj eterneco kvazaŭ kuniĝis, fariĝis unuo. La spirito de nia forpasinta samideano ŝvebis inter ni. Eksonis la himno de Esperanto. La solon bele kantis la junulino

Andrea Csőke, nia akompano sonis iomete necerte, timeme, sed ĉiu vorto kaj tono elfluis el nia koro. Poste la vidvino de la forpasinto, sinjorino Erzsébet Székely prenis la vorton. Ŝia parolo estis, kiel ĉiam ĉe tiuj okazoj tre sincera, tre varma, tre korduŝa.

Ni adiaŭis la spiriton de samideano kaj ekiris al la Malferma Universitato, kie ni daŭrigis nian solenan kunvenon. La junulino Blanka László, lemantino de muzika mezlernejo, ekludis sur violonĉelo la Preludon de J. S. Bach (Cello Suite No. 1). Ĉiela harmonio plenumis la spacon.

Gesamideanoj **Erzsébet Székely**, **Ljiljana Milenković**, **Sekelj- Magdolna Rövid**,

kaj **Đorđe Dragojlović** legis fragmentojn el verkoj de **Tibor Sekelj** kaj deklamis vaste konatajn poemojn, sed ankaŭ unu poemon lian ĝis nun ĉe ni nekonatan, sub la titolo "Homojn!", kiun **Sekelj** verkis verŝajne en Argentino, en 1939, antaŭ la Dua mondmilito. Poste kelkaj el la ĉeestantoj revivigis siajn rememorojn pri **Tibor Sekelj**. El tiuj mallongaj epizodoj ili ĉiam emfazis lian spiritecon, humoron, homkomprenemon.

La organizantoj eluzis la okazon por disdoni la atestilojn de la KER-ekzameno al kvin ĉeestantaj samideanoj kiuj sukcese ekzamenigis en Senta la 8-an de junio 2013. (En Senta ekzamenigis entute naŭ personoj, el kiuj kvar jam ricevis la atestilojn en Beograd.)

Kara nia samideano Tibor! Vi povas esti kontenta kaj fiera. La lingvo Esperanto vivas kaj evoluas! Ĝi estas ankoraŭ tre juna, ja ĉiuj aliaj lingvoj evoluis dum miloj da jaroj. Aperas junaj, agemaj fortoj, kiel ekzemple nia koleginino **Aranka László**, sekretariino de nia Societo, kiu kun kontribuo de **Erzsébet Székely** perfekte aranĝis tiun ĉi solenan kunvenon.

Por adiaŭo, sekvis kutima, neevitebla ĉe tiuj okazintaĵoj, regalo: tre bongustaj kukoj, kuketoj, salatoj, viandaĵoj, kafo, sukoj...



PAROLADO DE ERZSÉBET SZÉKELY ĈE LA TOMBO DE SIA EDZO



Kara Tibor!

Ne la unuan fojon vi batalis kontraŭ la morto, sed ĉiam vi estis la venkinto.

Antaŭ 25 jaroj, post tritaga batalo, viaj fortoj forestis, kaj ĝi venkis vin. Neniam mi forgesas la vizaĝon de la doktorino kiu anoncis la rezulton: "Li mortis." Tio estis nekredebla, ĉar apenaŭ ni komencis nian komunan vojaĝon. Vi promesis prezenti al mi vian farmon, la mondon, kaj neniam vi trompis min.

Estis malfacile kompreni, ke al vi iu Granda Sinjoro prezentas alian, eĉ por vi nekonatan mondon, kaj mi devas sole vagadi.

Ofte mi staris ĉi tie atendante kaj sopirante, ke vi revenu. Pasis la jaroj kaj la doloro mildiĝis kaj transformiĝis je memoro. Mi konsciiĝis, ke fizike jam neniam, sed en memoroj ĉiam vi estas kun mi kiam mi memoras

vian blujn okulojn, vian karesojn, vian feliĉan ridon kaj kiam en la pensoj mi denove travivas la belajn momentojn de nia vivo.

La memorŝtono kaj sur ĝi via nomo jam eluziĝis, sed vi plu vivas en via "Kumeŭaŭa". Maljuna Maloa jam en 24 lingvoj – ĝuste kiom vi iam lernis – diras: "*Kiu helpis al homo en malfacilaĵo, helpis al si mem*" kaj ke "*Fiŝojn oni mezuri laŭ longo, homojn laŭ ilia scio*". Vian spurojn sekvas bravuloj al Akonkagvo, portas vian nomon Esperanto-societoj. Oni memoras vin sur ĉiuj Kontinentoj.

Karaj amikoj, mi scias, ke vi ankaŭ gardas la memoron pri Tibor. Pro tio ni kolektiĝis ĉi tie, ĉar ni ne forgesis lin. Mi petas vin nun por momento, en silento, pensu pri via Tibor, tiel kiel li vivas en vi. Poste ni iru kaj en la Libera Universitato parolu pri li, kaj tiel li restos ankoraŭ kun ni.



PROFESORO PIŠKOREC MULTFLANKE AKTIVA

Josip Pleadin

Ekzistas esperantistoj kiuj laŭ sia difino ne estas movadanoj, sed kiuj por Esperanto plenumas enorman kaj escepte valoran laboron. Unu el tiuj sendiskute estas profesoro **Velimir Piškorec** el la germanistika fakso de la Filozofia fakultato en Zagrebo. Kiel ni jam raportis, profesoro **Piškorec** ankaŭ dum la aktuala akademika jaro gvidas kolecion "*Interlingvistiko kaj strukturo de Esperanto*", al kiu aliĝis kvardeko da studentoj.

La aktivecoj de profesoro **Piškorec**, ĉefe en la (inter)lingvistika kampo ne ĉesas en la fakultato mem, sed vaste transiras la limojn de Kroatio. Li jam delonge konatas en la interlingvistikaj rondoj pro siaj fakaj kaj sciencaj kontribuadoj.

En novembro 2012 profesoro **Piškorec** partoprenis la 22-an jarkunvenon de GIL (Gesellschaft für Interlinguistik), kiu okazis en Berlino. Antaŭ nelonge aperis kajero de "*Interlingvüistische Informationen*" (novembro 2013), en kiu troviĝas la 22-paĝa germanlingva teksto de la prelego de profesoro **Piškorec** prezentita en Berlino, titolita: "*Inter- und Öklingvistik in Vergleich: Ansätze, Traditionen, Schnittstellen*" (Inter- kaj eko-lingvistiko komparataj: teorioj, tradicioj, intersekcioj).

Dum pluraj monatoj profesoro **Piškorec** okupiĝas ankaŭ pri esplorado de la laboro de kroata lingvisto **Tomislav Maretić**, preparante volumon eldonatan ĉe UZE, en kiu aperas ankaŭ la fama teksto de **Maretić** "*Pensoj pri artefarita monda lingvo*" (1891).

Se resumi la tutan poresperantan laboron de profesoro **Piškorec**, ni ja vere devas fieri ke ni havas tian fakulon en niaj vicoj.

SEKELJ-GULAŜO: ĈARMA PEJZAĜO SUR PARNASO

✍️ YU Jianchao

Doktorino **Marjorie Boulton** en 1995 skribis artikolon memore al **Tibor Sekelj**, kun la titolo: *Sekelj-Gulaŝo de Diversaj Memoroj*. Kiam mi ĉinigis la titolon, ĝi ŝajnis stranga laŭ la koncepto de la ĉina kulturo. **Gulaŝo** (hungare: *gulyás*) estas plado populara en Hungario kaj aliaj landoj de orienta Eŭropo. Mi telefone demandis instruistino pri la hungara lingvo, ĉu la vorto *gulyás* metaforas ion alian? Ŝi respondis, ke ne. Ĝi signifas supon de bovaĵoj.

Mirigite mi tralegis la artikolon kaj elmaĉis la esencon de Esperanta kulturaĵo kaj la guston de tiu ĉi frandaĵo. *“Kvankam Tibor Sekelj dumtempe gastis ĉe ekskanibaloj, Sekelj-gulaŝo, hungare Székely, ne estas kanibala plado; ĝi enhavas porkaĵon, cepojn, lardon, acidan brasikaĵon, kremon, ajlon, karvion, salon, paprikon kaj aneton. Nu, sed Sekelj mem estis iom neordinara miksplado, en kiu mankis nek vere nutra viando, nek interesaj spicoj, nek iom da acideco... artisme, aktive, talente kaj psikologie, li ja estis kompleksa, multeca, foje paradoksa, sed neniam banala kaj sengusta!”*

Mi vidas, ke la brita verkistino ne babilaĉas. Mia instruisto sinjoro **Li Shijun (Laŭlum)** iam faris recenzon por la libroj de **Tibor Sekelj**. Li laŭdis, ke **Tibor Sekelj** *“estas naturdotita per talento de rakontado”*, kaj lia skribado *“karakteriziĝas per lia stilo de klareco, viveco, freŝeco, optimismo kaj spriteco”* (Laŭlum “Imitinda Ekzemplo” EPĈ 2/1994 p.16). Tamen li kritikis, ke Tibor *“troe uzas neologismon”* kaj samtempe miris, ke li lerte faris kreaĵon per enkondukitaj kaj la ordinaraĵoj vortoj.

Antaŭ tridek jaroj, mi legis libron **Faktoj kaj Fantazioj** kompilitan de doktorino **Marjorie Bulton**, kiel lernolibron. Mi tre kutimiĝis al ŝia maniero vicigi serion da pronomoj samkategoriaj. En la legado mi trovis, ke ŝia vicigo estas neniam simpla skribado sed ĉiam logika. Des pli, en la supre menciita plado *“Sekelj-gulaŝo”* viglas kelkaj vortetoj, kiaj *“lardo”*, *“salo”* kaj *“kremo”*, kiuj ofte metaforas respektive *“neologismon”* *“io, kio surprizas en konversacio kaj verko”* kaj *“plej eminenta parto...”* ktp. Tiaj vortetoj tre plaĉas al mi dum legado. Vere, traleginte la verkojn de **Tibor Sekelj**, oni ekkonis kiel telepatie komuniĝis la brita majstrino kun la *“mondvojaĝanto”*, 101-jara, ankoraŭ vivanta en nia koro. Mi admiras kiel rekte atingis la koron la energio ŝprucinta el la geniaj majstroj dum ilia renkontiĝo, kaj tiu energio sangige fluas ĉe mi tutkorpe... Diversaj admiroj!

Ŝi komentis, ke *“ĝi (Sekelj-gulaŝo) ankaŭ estas mirinda atestaĵo pri la kapablo de la homo: kuraĝo, adaptiĝemo, eltenado, scienca scivolemo, entreprenemo. La travivaĵoj de Sekelj ŝajnas sufiĉaj por dudek homaj vivoj.”* Dume ŝajnas al mi, ke ankaŭ ŝi meritas la titolon *“mondvojaĝanto”*, kvankam ŝi ne povas vojaĝi kiel **Tibor Sekelj** tra la mondo, tamen ŝi gvidas siajn legantojn sperti la ekzotikajn pejzaĝojn, lokajn manierojn kaj mirindajn fabelojn de la terĝlobo.* Ŝi angligis el manuskripto la libron de Tibor, **Nepalo Malfermas la Pardon**, kaj eldonis ĝin en Britio sinkrone kun la Esperanta versio de **Tibor** mem en 1959.

Ŝi admiris la poemaron de Tibor **Elpafu la Sagon**, opiniante, ke ĝi estas libro *“ne nur ĉarma kaj*

refreŝiga sed nobla kaj menslargiga ... temas pri la riĉa mozaiko de buŝa poezio en la mondo.” Dume sinjoro **Laŭlum** rimarkis, ke en la poemaro Tibor *“enkondukis preskaŭ 50 vortojn el la afrikaj, aziaj sudamerikaj kaj oceaniaj lingvoj, por akceli la veran internaciecon de la lingvo.”* La plej altan takson ŝi donis al la porinfana literaturo **Kumeŭaŭa – Filo de Ĝangalo**, tamen ŝi bedaŭris ke fiaskis la kunlaboro por eldoni ĝin en Britio.

Diversaj memoroj elfluas sub la plumo de la majstrino, ĉe ŝia plumo ridigas la anekdotoj: Sekelj iam ellernis jogon en Hindio. Foje li gastis ĉe la hejmo de patrino de la verkistino en Britio. Li estis ĉiam ĝentila al la patrino. Iumatene, kiam la patrino eniris la manĝoĉambrojn kun plado de ŝinko kaj ovoj, ŝi vidis, ke Tibor dece sed minimume vestita, staras sur la kapo kun nudaj piedoj en la aero. La patrino staris konsternita. Tibor, ĝentileme salutis per trankvila *“Bonan Matenon!”* kaj per lerta vibro de la piedfingroj. La kapstaranta gasto senaplombigis la patrinon, ke ŝi demetis la varman pladon ne sur la maton, sed sur la nudan lignan tablon. *“Ŝi ĉiam memoras Tibor amike, sed la tablo neniam plene resaniĝis...”*

Dume en la memoro de sinjoro Laŭlum, trans la tempo kaj spaco iu vorto, kiu ligas la vivon kaj la Morton, estas *“toa-pe”*, la ceremonia etiketo de Tuparioj, kanibala tribo en Amazonio (Brazilo). *“Toa-pe”* signifas *“banon en la rivero”*, kaj ĝin praktikis Tuparioj, kiam ili akceptis fremdajn gastojn. Kiam **Laŭlum** ripetis la vorton por akcenti la impreson pri **Tibor Sekelj** dum lia prelego en Pekino en la jaro 1980, la respektita sinjoro eĉ ne povis memori la

signifon de la vorto.

Feliĉe mi havis la poemaron *Elpafu la Sagon*, donacitan de sinjoro *Laŭlum* antaŭ lia forpaso. Kiam mi prenis la libron, mi demandis sinjoron, kiel oni ĉinigu la titolon. La sinjoro jam havis la konsideron, kaj elbuŝigis Jianzai Xianshang «箭在弦上». Mi eklegis la poemojn kaj vere gustumas la "Sekelj-gulaŝon". Tio okazis unu monaton antaŭ lia forpaso.

Tuj mi memoras, ke pasintjare ni feriiis en Hungario kaj unu aŭ dufoje ni ĝuis la hungaran frandaĵon "gulyás". Mi diru, ke mi ja gustumis vere hungaran "gulyás".

Mi refoje telefonis al la instruistino de la hungara lingvo por demandi kiel kuiri "gulyás". Ŝi diris, ke ĝi estas ne pli ol supo de bovaĵo! Do, post laboro, mi haste revenis hejmen kaj elprenis pecon da kruda bovaĵo el fridujo, kolektis cepojn, ajlon, paprikon, terpomon, aneton ... kaj ankaŭ tomaton. Du horojn poste, mia ĉinstila gulaŝo sukcesis kaj estis tre bongusta.

Sed mi ankoraŭ ne povis trafe ĉinigi la titolon Sekelj-gulaŝo de diversaj memoroj. Vere, fideleco, trafo kaj eleganteo en tradukado laŭ la instruo de *Laŭlum* estas nefacile atingebla celo.

Frandaĵo eltiras salivon, belskribo skuas la animon. Doktorino *Bulton* kuiris la Sekelj-gulaŝon, kiu ŝajnas al mi ĉarma pejzaĝo sur Parnaso, kune kun maro da verkoj de *Tibor Sekelj*, psike nutranta la legantojn kaj meritanta esti unu el la pladoj de Esperanta festeno.

2013, en Qingdao

* Mi iam ĉinigis el la libro iujn rakontojn, legendojn, fabelojn kaj ilin aperigis en la porinfana revuo de mia naskiĝurbo Qingdao (kie iam okazis la 5-a Azi-pacifika Kongreso de Esperanto).

LA GREKA KNABINETO

Lenke Szász

Mia frato jam estis dekjara kiam mi naskiĝis. Mi ne memoras ĉu iam ni ludis kune. Li estis knabo, kaj knaboj ne ludas kun knabinoj, precipe ne kun etulinj. Baldaŭ li eklernis en urba gimnazio poste li devis militservi. Fakte, ni ne havis komunan infanecon. Ĉiam mi estis sola. Miaj gepatroj laboris, kaj mi devis elpensi ludojn por mi mem, por ne enuiĝi. Antaŭ ol iri en lernejon, mi jam sciis skribi "preslitere". Mi memoras, ke foje mi skribis "gazon" sur kvar paĝoj de lerneja kajero. Mi ne havas memoron pri la enhavo, sed nur pri la plezuro ke mi "faras gazeton". Diligente mi laboradis sola en silentaj horoj de posttagmezo, dum la patro kaj la patrino laboradis.

Alia kara memoro estas, ke la avino laŭtlegis por mi partojn el siaj ŝatataj legaĵoj, kiam mi vizitis ŝin dimanĉan posttagmezon, kun permeso de mia patrino.

Poste mi mem iĝis pasia legantino. Tiutempe en mia naskiĝvilaĝo ankoraŭ ne estis elektro. Mi legadis ĝis plena vesperiĝo ĉe fenestro. Kiam mia patrino ekvidis min legantan ĉe lumo de fajro de la forno vintre, ŝi riproĉis al mi, ke mi difektos miajn okulojn legante en mallumo.

Baldaŭ mi komencis skribi taglibron kaj verki fabelojn. Neniu legis miajn skribaĵojn, ĉar mi skribis por mia plezuro. Ja ĉiam mi estis sola. Eĉ kunludantinojn mi ne havis, ĉar ankaŭ la najbaroj ne havis infanojn.

Foje mi ekaŭdis diskuton de miaj gepatroj. Ili aŭdis, ke oni venigos en la vilaĝon grekajn infanojn, kaj familioj devos akcepti kaj prizorgi ilin. Tiutempe, en la postmilitaj jaroj, la vilaĝanoj ne havis facilan vivon. Okazis ankaŭ



ŝanĝo de la reĝimo. La kampanoj estis devigitaj membriĝi en kolhozo kaj rezigni pri la propraj terpeco, bovino, ĉevalo. Tiuj, kiuj provis rezisti, suferis persekutadon, kaj iuj eĉ mortis pro kruela bato de sekurecpolicanoj. Kreskigi ankaŭ fremdan infanon, nun mi komprenas, ne estis feliĉa perspektivo por miaj gepatroj.

Sed mi, mi ekĝojis! Venos eble greka knabineto, kaj mi havos iun por kunludi, mi havos fratinojn! Tiutempe mi eĉ ne pripensadis, kial greka infano ne restas en Grekio kune kun siaj gepatroj. Nenion mi sciis pri tiutempaj politikaj eventoj okazintaj en Grekio. Mi atendis la grekan knabineton. Mi eĉ ne imagis, ke greka infano parolos por mi nekonatan lingvon. Ja ĉiuj homoj en la vilaĝo parolis hungare, kaj mi ne aŭdis aliajn lingvojn, eĉ mi ne sciis, ke ili ekzistas. Se pluvus en nia vilaĝo, mi kredis, ke samtempe pluvas ĉie. Ja mia tuta mondo limiĝis je mia vilaĝo.

Mi atendis la grekan knabinon. Se okazis, tre malofte, ke aŭtomobilo ekaperis en la vilaĝo, mia koro ekbatis: Eble nun venas la greka knabineto! Sed ŝi ne alvenis. Eble ŝi venos per trajno. Sed ankaŭ per trajno ŝi ne venis. Neniu greka infano venis en nian vilaĝon, kaj mi restis sola, sen fratino.

Eĉ nun mi atendas ... la grekan knabineton.

Literatura konkurso "Ivo Rotkvić"

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE), konforme al sia laborprogramo, anoncas renovigon de *Literatura konkurso "Ivo Rotkvić"*, lanĉita de la iama *Zagreba Esperanto-Ligo*, kun la celo stimuli ĉiaspecan literaturan kreadon en Esperanto, malkovri literaturajn talentulojn kaj konigi iliajn verkojn en Esperantujo per premiado kaj publikigo en "Zagreba Esperantisto" aŭ libroforme.

UZE anoncas ĉi tiun konkurson okaze de *Zamenhofa tago*, kiu dekomence estis konsiderata *Tago de Esperanta libro*.

UZE invitas ĉiujn literaturemulojn de Esperantujo partopreni en la jenaj konkursaj branĉoj:

1) *Originala prozo*. (inkluzive de teatraĵoj). Maksimuma longo de konkursaĵoj nefiksita, sed preferataj mallongaj prozaĵoj.

2) *Originala poezio*. Maksimuma longo nefiksita, sed preferataj mallongaj poeziaj formoj.

3) *Tradukaĵoj el la kroata*. Maksimuma longo nefiksita, sed preferataj mallongaj prozaĵoj

aŭ poeziaĵoj de aŭtoroj mortintaj antaŭ pli ol 70 jaroj aŭ de tiuj kiuj donis skriban permeson traduki kaj senpaga publikigi iliajn verkojn.

3) *Tradukaĵoj el aliaj lingvoj*. Maksimuma longo nefiksita, sed preferataj mallongaj prozaĵoj aŭ poeziaĵoj de aŭtoroj mortintaj antaŭ pli ol 70 jaroj aŭ de tiuj kiuj donis skriban permeson traduki kaj senpaga publikigi iliajn verkojn.

Konkursi povas nur la ĝis nun nepublikigitaj verkoj, aŭ la verkoj kiuj aperis en interreto. Ĉiu konkursaĵo estu aparta *word* aŭ *pdf*-dokumento, subskribita per pseŭdonimo kaj alkroĉita al la retmesaĝo, en kiu estu skribita la vera nomo de la aŭtoro/tradukinto kaj lia/ŝia retadreso. UZE elektos la jurion kiu prijuĝos ĉiujn ricevitaĵojn. Laŭreatoj estos premiitaj per diplomoj kaj libropremioj. UZE retenos dum unu jaro la ekskluzivan rajton publikigi ĉiujn premiitajn (kaj nepremiitajn) konkursaĵojn en "Zagreba Esperantisto" aŭ en apartaj libretoj.

Konkursajojn oni sendu antaŭ la 30-a de majo 2014 rete al zagreba.esperantisto@gmail.com.

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj
establas la premion

Premio "Degenio velebita"

Degenio velebita (lat. *Degenia velebitica*) estas floro, unu el la plej maloftaj endemiaj specioj en Kroatio, severe protektita, simbolo de la plej alta kroata montaro *Velebit*. Ĝi troviĝas sur la reverso de la 50-lipaa monero.

La Premion "Degenio velebita" establas UZE kiel iaspecan ĵurnalistan premion por kunlaborantoj de "Zagreba Esperantisto" kaj la portalo www.zagreba-esperantisto.hr.

La Premion "Degenio velebita" ĉiujare atribuos la redakcio de "Zagreba Esperantisto" al la plej aktiva artikol-verkanto en difinita unujara periodo. La Premio estos aljuĝata laŭ la kvanto kaj kvalito de aperintaj artikoloj, kaj proklamata okaze de Zamenhofa tago. La unuan fojon ĝi estos proklamita en decembro 2014.

Partopreni en la konkurado povas ĉiuj legantoj, kunlaborantoj kaj membroj de la redakcio, escepte de la ĉefa redaktoro kaj la plenumredaktoro. Ankaŭ la legantoj povas sendi siajn proponojn por la plej bona kunlaboranto.

La Premio estas honora, kaj konsistas el respektiva diplomo. Laŭ eventuala decido de la redakcio, la Premio povas konsisti ankaŭ el materia aŭ mona rekompenco.





Atingis min la nova numero (3/2013) de via ŝatata revuo. Jam sur la kovrilo estas bela foto de junulino kio certe pli allogas la legantojn. Daŭrigu tiel! Interesoplena estas la ĉefartikolo de samideano Milošević, enhavanta faktojn kiujn multaj ankoraŭ ne scias. La tuta temaro estas varia kaj oni povas trovi multon laŭprofesie. Mi legis atente du raportojn de Maria Butan kaj aparte raportojn kaj impresojn pri la Adriatika Feriado, pro kiu mi envas ĉiujn partoprenintojn. Interesaj estas ankaŭ la publikigitaj historiaĵoj.

Bardhyl Selimi (Tirano, Albanio)

Mi gratulas al vi pro la numero 2/2013 de "Zagreba Esperantisto". Daŭrigu tiudirekten! La gazeto estas sendata al eksterlando kaj oni devas skribi pri temoj kiuj ne havas rektan ligon kun Esperanto, sed estas interesaj al la legantoj. Konigo de homoj kaj belaĵoj de nia lando estas ĉiam bonvena.

Olga Ŝtajdohar-Paden (Zagreb)

RENOVIGU VIAN JARABONON POR 2014:

**120,00 kunaĵoj /
18,00 eŭroj**

Pagebla al konto de
Dokumenta Esperanto-Centro:
HR5023600001102158381
aŭ al **UEA-konto:**
deoc-f

Publike pri Esperanto

- "**Karlovaĉki tjednik**"
en sia numero 30 de la 25-a de julio 2013 publikigis la artikolon "*Petodneva plovidba uz raznovrsne sadržaje*" de sia ĵurnalisto S. Lalić.

- "**Karlovaĉki tjednik**" en la numero 32 de la 8-a de aŭgusto 2013 publikigis la artikolon "*Sa četiri čamca niz Kupu*".

POR BONFARTO DE NIA REVUO

1. Raita Pyhälä kaj Kerstin Rohdin	280,00 kunaĵoj
2. Roland J. Glossop	14,00 eŭroj
3. Ljubica Sedmak	120,00 kunaĵoj
4. Dušan Adnadž	50,00 kunaĵoj
5. Anonima	1.000,00 eŭroj

Forpasis Lena Karpunina



(1963-2013)

Lena (Jelena) Karpunina naskiĝis la 17-an de februaro 1963 en Rusio kaj kreskis en Dušanbeo, la ĉefurbo de Taĝikio. Tie ŝi diplomiĝis en teknika universitato kaj akiris la diplomon de aŭtomobilingeniero. Ekde 1993 ŝi loĝis en Germanio kun sia edzo Gerd Bussing, kaj estis membro de Berlina Esperanto-Ligo.

Esperanton ŝi lernis en 1988, kaj ekverkis en Esperanto en 1996, post la Praga Universala Kongreso de Esperanto. Kiel temo por ŝiaj rakontoj ofte servis ŝia junaĝa vivo en Dušanbeo.

Ŝi estis ĉefe novelistino. Ekde 2001 ŝi estis membro de Esperantlingva Verkista Asocio (EVA). Multaj ŝiaj noveloj aperis en "Fonto" kaj "Monato". Libroforme aperis du novelaroj: **La Bato** en 2001 (dua eldono 2006) kaj **Neokazinta Amo** en 2007. Ŝi estis plurfoje premiitaj en la Belartaj konkursoj de UEA. En 2010 ŝi estis elektita membro de la Akademio de Esperanto.

En Kroatio ŝi gastis en la Renkontiĝo de Esperantlingvaj Verkistoj en Hraščina en 2008, kaj tiuokaze "Zagreba Esperantisto" intervjuis ŝin (vidu la intervjuon en la numero 4 (8)/2008, paĝo 130).

Ŝi forpasis, post serioza malsano, la 4-an de novembro 2013.



Donu
flugilojn
al via talento!

Publikigu vian
propran libron
per nia helpo!

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj eldonas etkvante
kaj favorpreze libr(et)ojn en siaj serioj!
Se vi havas ion por publikigi, nun estas la
ĜUSTA MOMENTO!

zagreba.esperantisto@gmail.com